

El

人民中國報道

POPOLA

ĈINIO

1  
1962





La printempa festo en Pekino

# Novjara Saluto

**E**N la komenco de la nova jaro 1962, ni sendas niajn korajn salutojn unue al vi — karaj legantoj en ĉiuj partoj de la mondo;

Al vi — ĉiuj fratoj, kiuj diligente kaj pene laboras por la grandioza socialisma kaj komunisma afero de Moskvo ĝis Hanojo, kaj de Tiraneo ĝis Pjengjango;

Al vi — heroaj batalantoj, kiuj persiste luktas en tranĉeoj kaj arbaroj de Alĝerio, Angolo, Kongolando kaj aliaj lokoj en Afriko por sia nacia sendependeco, kontraŭ imperiismo kaj koloniismo;

Al vi — ĉiuj kiuj persiste batalas en diversaj landoj de Azio kaj Latinameriko kontraŭ la sklavigo, agreso kaj interveno fare de la novaj kaj malnovaj imperiistoj por akiri plenan suverenecon kaj teritorian integrecon de sia patrolando;

Al vi — ĉiuj kiuj senlace batalas por paco, demokratio kaj socia justeco en diversaj landoj tra la mondo;

Al vi — amikoj de la ĉina popolo en la tuta mondo;

Al vi — ĉiuj amantoj de la zamenhofa lingvo, Esperanto.

Kiel ĉi tie ĉe ni oni pasigas Novjaron?

Niaj legantoj povas imagi, ke Novjaro estas la plej ĝoja tempo por la infanoj. La ĉinaj infanoj, kiuj kreskis en paca medio en la dek du jaroj depost la Liberiĝo en 1949, ĝojsaltas ĉie sin amuzante per petardoj aŭ belaj lanternoj laŭ la tradicio de nia nacio. La junuloj kaj infanoj simbolas la printempon de la homaro. Ili ne scias ke en aliaj lokoj sur la tero ekzistas ankoraŭ milito, malsato kaj subpremo fare de homoj al aliaj homoj. Ili estas ja tro junaj.

Baldaŭ post la Novjaro venos la Printempa Festo, t.e. Novjaro laŭ la luna kalendaro. Ĉijare la Printempa Festo venos je la 5a de februaro. Tio estas tradicia festo por la ĉina popolo jam dum miloj da jaroj, festo eĉ pli gaja kaj amuzplena ol la Novjaro. Antaŭ kaj post tiu ĉi festo la lernejoj kaj institucioj ĉiuj havas feriojn. Miloj kaj miloj da junuloj provizore forlasas sian lernejon kie ili loĝas, kaj revenos al sia varma hejmo por pasigi sian agrablan libertempon.

La tempo de la Novjaro kaj la Printempa Festo estas ankaŭ tiu por artaj kaj sportaj agadoj. Diversaj profesiaj kaj amatoraj kant- kaj danc-grupoj, teatraj trupoj kaj akrobat-trupoj kun riĉa kaj varia programo venas al fabrikoj kaj vilaĝoj por prezentado, celebrante la Novjaron. En Pekino oni povas spekti konkurson de glaci-glitado, dume en Kantono tiun de naĝado.

En dekmiloj da popolaj komunumoj, oni ĝuas novajn tagojn amuzante sin per ludoj de leono-danco aŭ drak-lanternoj. En la lasta jaro ili akiris multe pli bonan rikolton ol en la antaŭlasta. Dank' al la supereco de la organizo de la popolaj komunumoj, ili venkis la gravajn naturajn katastrofojn en la pasintaj tri jaroj. Pri tio la vastaj amasoj de kam-

## EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Administracio: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

### Enhavo de N-ro 1 (72) 1962

Bildo sur la kovrilo — La Geedziĝa Danco de Miaŭ-nacio

Novjara Saluto

Vizito al Gianming-popolkomunumo

Por Subteni Agrikulturon

“Mito” pri Fiŝoj

Sur Tero Revivigita

Aĝie Ĝiasa

Liĉi-mielo

Familio en Montvilaĝo

Ĉaso

Kunveno de Papilioj apud Lancang-rivero

Sanatorioj en la Okcidenta Montaro de Pekino

La Dudek Kvar Sun-periodoj

Vang Lanĵing, la Popola Asesorino

“Granda Ŝanĝiĝo de la Flava Rivero”

Faden-marioneta Ludo de Kjuanĝou

Ĉevalrajdaj Sportoj de Nova Ĉinio

Fundamentaj Reguloj de la Ĉina Ŝako

Rakontoj pri Afanti


Ĉinio

# Vizito al Gianming-popolkomunumo

**E**N Zunhua-gubernio, Hebej-provinco, kaj sude de la fama malnova Granda Muro troviĝas alttensia elektra linio kuranta paralele kun la ŝoseo. Piedirante laŭ ĝi vi povas veni al Hipu-vilaĝo, kie estas la sidejo de la administranta komitato de la Gianming-popolkomunumo. La vilaĝo situas en longa kaj mallarĝa

ravino ĉirkaŭita de montoj sur tri flankoj. Ĉirkaŭrigardante ĉe vilaĝando, vi tuj trovos ke giganta ŝanĝo jam okazis en la loko kiu estis dezerta dum multaj pasintaj jarcentoj: ĉie videblas verdaj plantaĵoj ondigaĵoj en la vento, strioj post strioj da deklivaj terpecoj kaj teraskampoj dense borderas la ondigaĵajn montojn, aroj post aroj da junaj arboj aspektas kaj vive kaj gaje, kaj pli fore nov-konstruitaj domoj tie kaj ĉi tie estas videblaj post la arbaroj.

Kvin kilometrojn oriente de Hipu-vilaĝo estas montbreĉo, kie kunfluas la fontoj. Ĉiun pluvan sezonon en la pasinteco, kiam subite altorentis la akvoj



*Jen, Gianming-lago!*

*Foto de Hinhua*

paranoj estas fieraj. Ĉina proverbo diras: “La tutan jaron decidas la printempo”. Nun ili estas planantaj la printempan plugadon. Ili firme kredas ke por la jam alveninta nova jaro ili akiros riĉan rikolton kaj ankoraŭ pli bonan vivon.

La nuna jaro estas la lasta jaro de la Dua Kvinjara Plano de la nacia ekonomia konstruado. Fakte la celitaj ciferoj de la produkt-valoroj de kelkaj industrioj fiksitaj en tiu plano estas jam atingitaj en la 3-a aŭ 4-a jaro. Nun la laboristoj estas pretaj kun plena kredo superi en la kuranta jaro ĉiujn celitajn ciferojn de la Dua Kvinjara Plano por ĉiuj industrioj.

Grandan disvolviĝon montras la amikaj rilatoj inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La imperiistoj volis izoligi Ĉinion kaj ĉinan popolon per ĉiaj rimedoj, sed iliaj komplotoj definitive fiaskis. Dum la jaro ĵus alveninta, la ĉina popolo faros pli grandan kontribuon por la mondpaco kaj por la amikeco kaj paca kunekzistado inter diversaj landoj.

Karaj legantoj, jen estas unua novaĵo el la nova Ĉinio en la jaro 1962.

Ni deziras ke la popoloj en diversaj landoj, same kiel la ĉina popolo, marŝu antaŭen kun plena konfido sur la vojo de paco, feliĉo kaj progreso.

— La Red.



de la montoj, forportiĝis sennombraj plantaĵoj, domoj, kortbirdoj kaj hejmbestoj. Sed post la fondiĝo de la Gianming-popolkomunumo en 1958, oni konstruis tie ĉi altan digon longan pli ol 200 metrojn el tero kaj ŝtonoj, kiu transformis la antaŭe furiozan akvegion en lagon de mildaj ondoj. Ĝi estas Gianming-lago, la plej granda akvokonservejo de tiu popola komunumo. La akvokonservejo entenas pli ol 3,000,000 kubmetrojn da akvo kaj povas irigacii 1,600 hektarojn da tero. Unu el la komunumanoj diris al mi, ke pro la baldaŭa alveno de la pluva sezono en la montregiono, oni ellasis antaŭ nelonge la akvon el la tuta lago, sin-preparante por reteni kaj briditi la akvegion. El la lago ili kaptis pli ol 2,000 kilogramojn da fiŝoj, kaj tio estis la unua abunda rikolto de fiŝkaptado en la historio de tiu ĉi montregiono.

Iru ĉirkaŭ kvin kilometrojn suden de Gianming-lago, kaj vi atingos "subteran akvokonservejon", kiu estas konstruita sub sekiĝinta riverlito. Fosinte tie ĉi subteran tranĉeon 6 metrojn profundan, 8 metrojn larĝan kaj 350 metrojn longan kaj per kalko kaj argilo, oni konstruis en la tranĉeo subteran digon kaj konservas la subterajn fontojn. Nun, kiam vi venas viziti la lokon, vi vidas sur la vasta montregiono kampojn, arbetarojn, montetojn kaj nekultureblajn fluejojn, sed vi neniam povas imagi ke ĝuste sub viaj piedoj sin trovas "subtera akvokonservejo" el kunfluintaj fontoj. Ĉe la piedo de la monteto apud tiu ĉi "subtera akvokonservejo" estas elektra pumpstacio. Per motoro ĝi povas pumpi tra longa fera tubo la subteran akvon supren al la montpinto, de kie la akvo daŭre fluas al la akvomankantaj deklivaj terpecoj kaj teraskampoj laŭ kelkaj kanaletoj ĉirkaŭirantaj la montojn.

Hodiaŭ la plejparto el la pli ol 3,000 hektaroj da agroj de la komunumo estas irigaciata. Jen kuŝas la sekreto kial tiu ĉi akvo-manka popolkomunumo montregiona povis esti ne influita dum la pasintaj du sinsekvaj jaroj de serioza sekegeco. La meznombra produktokvanto po muo de la tuta komunumo en 1960 pliiĝis je 2.8% kampare kun tiu en 1959 kaj je 9% kompare kun tiu en 1957 antaŭ la fondiĝo de la popola komunumo.

En malnova Ĉinio la kamparanoj ĉi-tieaj uzis nur plugilojn tiratajn de bestforto aŭ homforto por terkulturado, sed nun agrikulturaj maŝinoj estas uzataj. Mi vizitis la traktor-stacion de la popolkomunumo apud la ŝoseo ne malproksime de Hipu-vilaĝo. La komunumo nun posedas 13 traktorojn, pli ol 100 agrikulturajn instrumentojn maŝintiratajn, pli ol 10 motorojn kaj 7 ŝarĝaŭtojn. Ĉiujn tiujn ĉi modernajn agrikulturajn instrumentojn kaj transportilojn aĉetis la popola komunumo dum la pasintaj du-tri jaroj. Mekanikigita terkulturado estas praktikata en la ĉefaj agrikulturaj laboroj sur la ebena regiono de la komunumo. Sekve ĝi povas ne nur efektiviĝi plugadon kaj semadon en rafinita maniero, sed ankaŭ disponigi pli multe da homforto por disvolvi en multaj flankoj. Krom agrikulturo la popolkomunumo nun entreprenas tiajn

flankajn produktojn kiaj paŝtado, forstokulturado, fruktoarba kulturado, drogkolektado, fiŝbredado, ktp.

En la ravino malpli ol du kilometrojn antaŭ la vilaĝo troviĝas kelkaj fabrikoj fonditaj de la komunumo. Inter ili la pli grandaj kaj pli viglaj estas la riparejo por agrikulturaj instrumentoj kaj la nutraj-fabrika.

La riparejo por agrikulturaj instrumentoj de la popolkomunumo konsistas el ses laborejoj por tornado, forĝado, muntado, veldado, fandado kaj ligno-prilaborado. Ĉi tie mi vidis samtempe maŝinojn kaj manipolatajn manlaborilojn. El la proksimume 90 laboristoj de la riparejo, la plejparto estas gekomunumanoj ĉirkaŭ 20-jaraj. Ili riparas traktorojn, ŝarĝaŭtojn kaj ĉarojn kaj fabrikas por ili diversajn akcesorajojn. Krome, la laboristoj ankaŭ fabrikas kaj riparas por la komunumanoj diversajn laborilojn por produktado kaj ĉiutaga vivo.

La laboro de la nutraj-fabrika ampleksas multajn flankojn, ĝi produktas vinon, bombonojn kaj sodan akvon kaj ankaŭ oleon kaj vermicelon. La krudaj materialoj estas tute provizitaj de la komunumo mem kaj la produktitaj varoj atingas 30 specojn. Ili estas ekskluzive por la konsumo de la komunumanoj.


Ŝajnas al mi ke la vivo de la komunumanoj estas kontentiga. En Hipu-vilaĝo, troviĝas firma kiu havas 10 filiojn en la diversaj lokoj de la komunumo. Ĝia direktoro diris al mi ke la kvanto de podetala vendado de tiu ĉi vendejo kreskas jaron post jaro. Tiu en 1960 estis duoblo de tiu en 1959 kaj kreskis proksimu-

*Maizospikoj rikoltitaj de la Produkta Brigado de Hipu.  
Foto de Hinhua*



me kvaroble pli ol tiu en 1956, t.e. dum la tempo de altgrada kooperativo. Precipe altaj estas la vendokvantoj de bicikloj, radio-riceviloj, kudromaŝinoj kaj fontoplumoj. Bicikloj jam fariĝis la ĉefaj komunikiloj ĉi tie kaj sin trovas pli ol 2,000 en la tuta komunumo, nome unu po du familioj meznombre.

*La komunumaj traktoroj plugas teron antaŭvintre. Foto de Hinhua*



Ĝang Honghju:

## Por Subteni Agrikulturon

— Rakonto pri la plibonigo de U-ŝtalo en la Ferŝtala Kompanio de Anŝan —

**E**N junio 1961, la Klienton-vizitanta Delegacio de la Ferŝtala Kompanio de Anŝan alvenis al la Luojang-a Traktora Fabriko. Tuj post elaŭtiĝo, la delegacio estis ĉirkaŭita de la laboristoj de la traktora fabriko. “Finfine vi venis!” diris iu maljuna laboristo, prenante la manojn de la vizitantoj. “Kiel multe vi helpis nin dum la pasintaj jaroj! Vi provizis nin per ĉiaj ŝtalproduktaĵoj kiajn ni bezonis kaj sendis ilin al ni ĝustatempe kiam ajn ni bezonis. Dank’ al via subtenado nia fabriko produktas ĉiam pli multe da traktoroj.” Alia laboristo diris: “La traktoro kiun ni fabrikas povas plugi ĉiutage 5 hektarojn da tero, kaj tio egalas al la laborforto de dudek kelkaj bovoj. Sekve la kamparanoj intime nomas ĝin ‘ferbovo.’”

Posttagmeze la delegacio estis invitita pririgardi la laborejojn. Kiam ili eniris laborejon, ili rimarkis ke iu junulo estas kontrolanta ĵus traboritan ĉeftrabon de traktoro. Rigardinte apude sufiĉe longe, iu kama-

La privata ŝparita mono de la komunumanoj en la ŝparkasejo en la vilaĝo ankaŭ pliiĝas ĉiujare. La statistiko de la ŝparkasejo montras: ĉe la fondiĝo de la popola komunumo en 1958, la sumo de la privata ŝpar-mono de la tuta komunumo estis 96,000 juanoj; en 1959 ĝi estis 106,800; en 1960 ĝi fariĝis 139,781; kaj ĝis junio 1961 ĝi kreskis eĉ ĝis 200,561.


La popolkomunumo nun havas malgrandan hospitalon kaj ses higienajn staciojn. Krome, aliaj bonstatigaj instalaĵoj kiel infanvartejoj, infanĝardenoj, kaj sanigejoj por virinoj kaj infanoj estas ĉie starigitaj. La plejparto de la hejmoj en tiu ĉi montregiono havas elektrajn lampojn. En la komunumo estas 2 mezgradaj kaj 43 elementaj lernejoj, kie lernas 95% de la lernejaĝaj infanoj.

Kiam mi revenis kun malrapidaj paŝoj al la oficejo de la administranta komitato de la popolkomunumo, ĝia direktoro Vang Guofan kiu min akompanis dum la rondvizitado diris al mi: “Niaj idealoj estas paŝon post paŝo efektiviĝantaj. Sed ni estos neniam kontentaj. Ni nepre transformos tiun ĉi antaŭe malriĉan valon en abundan lokon.”


rado el la delegacio demandis: “Kia estas la kvalito de la trabo?” La junulo senhezite respondis: “Ĝi estas bonkvalita ĉu laŭ tensio aŭ laŭ firmeco. Sed estos pli bone se oni ankoraŭ iom ŝanĝos ĝin en la normo!” Aŭdinte tion, Jang Guobin, respondeculo de la delegacio, tuj demandis kia plibonigo estas bezonata. La junulo kondukis ilin al iu traktoro, klinis sian korpon kaj diris montrante ĝian framon: “Rigardu! Ĉar la ‘dorso’ de la U-ŝtalo ne estas sufiĉe ebena, la framo ne povas strikte kontakti kun la motoro, tiel ke la traktoro pli facile difektiĝos. Krome, el la ‘kruroj’ de la U-ŝtalo dekliniĝas iuj internen dum aliaj eksteren, tiel ke aliaj maŝinpecoj facile malfirmiĝas sur ili ĉe ekskuo. Estos pli bone se vi elpensos rimedon por pliebenigi la ‘dorsan’ de la U-ŝtalo kaj redukti la toleratan dekliniĝon ĉu internen ĉu eksteren de la nuna 0.8 m.m. ĝis malpli ol 0.5 m.m.” Post tio ili venis al loko kie ŝtalmaterialoj estis plene amasigitaj. Kiam

*Traktoroj, produktitaj de la Luoĵang-a Traktora Fabriko tuj transportataj al la kamparo.*

*Fotoj de Hinhua*



*La Laminejo de Mez-tipaj Ŝtalajoj de Anŝan produktanta ŝtalajojn por traktoro.*



Jang Guobin kaj la aliaj vizitantoj notis kion la laboristoj diris. Kiam ili trairis la laborejojn, la notoj tie faritaj, kune kun tiuj kiujn ili faris en la administrejo, jam plenigis iliajn notlibrojn. Ili promesis al la laboristoj ke post la reveno al sia uzino ili nepre plibonigos la laboron laŭ iliaj deziroj.

Reveninte de Luoĵang, la delegacio transdonis la postulojn de la laboristoj de la traktora fabriko al la laboristoj kaj oficistoj de la laminejo. Ĝang Kingjen, estro de laminata taĉmento, diris: "Subteni la traktoran fabrikon signifas subteni agrikulturon. Por ke la 'ferbovoj' estu sanaj kaj fortikaj, ni devas ĉiel ajn kontentigi la dezirojn de la traktora fabriko!" La kunkeno daŭris de la tria ĝis la sesa posttagmeze.

Malgraŭ ke ĉiuj estis jam tre lacaj, neniu volis reiri hejmen. La saman nokton komenciĝis la preparaj laboroj por modifi la formon de U-ŝtalo No. 18.

Tiunokte, la elektraj lampoj en la plankontoro de truo tipo lumadis tra la tuta nokto. Inĝeniero Ĝaŭ Gikun, teknikisto Lin Gianĉun kaj aliaj jen trarigardis teknikajn materialojn, jen iris al la laborejo por mezuri la truo tipon kaj la laminatcilindrojn, jen manipulis la kalkulilon aŭ desegnis ion sur la desegna papero.

La sekvintan frumateno Ĝaŭ Gikun transdonis al la ĵus alveninta fabrik-direktoro Jaŭ Gi la projek-

ili vidis la laboristojn penegre tranĉi pecon da U-ŝtalo rektiginte ĝin per fajro, ili sentis sin treege maltrankvilaj, kulpigante la laminejojn pri la livero de tiaj ŝtalproduktaĵoj al frataj fabrikoj. Aŭdinte ilian interparolon, iu laboristo kun ambaŭ manoj plene olemakulitaj diris al ili: "Tiuj ĉi ŝtalproduktaĵoj ne estis malbonaj kiam oni elliveris ilin. Sed pro sia longeco, ili deformiĝis dum la transportado. La materialo por la framo de la traktoroj estas 2.5 m. longa, sed la U-ŝtalo kiun vi liveras al ni estas aŭ 8 m. aŭ 12 m. longa, sekve de ĉiu peco ni devas fortranĉi iom da superfluaĵo ĉe la ekstremo. Vane perdiĝas ĉiujare materialo sufiĉa por fabrikigi ĉirkaŭ 100 traktorojn."

# “Mito” pri Fiŝoj

LA rivero, ne malgranda, estas branĉo de Jangzi-rivero. Estis printempo kaj la rivero ekfluis torente. Ne malproksime de la vilaĝo en la supra riverfluo, trans kelkaj danĝeraj rokaj malprofundejoj troviĝis la konstrutereno, kie unu akvoutiliga konstruaĵo estis intense farata. De post kiam la konstruado komenciĝis, tiom da novaj, mirindaj aferoj estiĝis jam en la ĉirkaŭaj vilaĝoj, ke la vivo turniĝis subite en tiun de fabela lando. En tiu ĉi fora montregiono, kie la elektraj lampoj, neniam antaŭe viditaj, nun tie kaj tie hele lumas. Estis ankaŭ bolanta bruado de homaj voĉoj kaj zumzumado de maŝinoj. Altaj domoj stariĝis unu post alia. Kaj aperis diversaj veturiloj,



kaj mirindaĵoj, el kiuj brilis la lumo de la nova vivo, sinsekve okazis tie.

Lastatempe en la vilaĝo oni kaptis fiŝojn kun numeroj. Sur ilia naĝilo brilas ruĝa etikedo el plastiko kun kvin ciferoj. Mirinde estis ke ne nur unu sed multaj homoj el la vilaĝoj tiajn fiŝojn kaptis. Per tre tre maldika metala filamento oni alligis al naĝilo de la piceusoj<sup>2</sup>, idelusoj<sup>3</sup>, molitriksoj<sup>4</sup> kaj nobilisoj<sup>5</sup> etikedon, pro kies hela koloro oni povas facile rimarki ĝin je la unua rigardo.

Ĉe la komenco, ĉiuj miris pri tio ĉi, sed iom poste, kiam oni kaptis pli kaj pli multe da fiŝoj tiaj, oni ne plu sentis tion stranga. La komunumanoj diris: “Jen unu plua!” Ili ĉiuj scias kion fari kun tiaj fiŝoj, ĉar en la ĵurnalo oni legis anoncon, laŭ kiu oni deprenas la etikedon, pesas la fiŝon kaj faras raporton al la loka partikomitato. En urbego de la najbara provinco estas scienc-esplora institucio de akvaj vivaĵoj kiu havas la taskon kolekti tiujn etikedojn kaj koncernajn materialojn, kaj kie la sciencistoj volas scii, kiom pezas ĉiu el tiuj fiŝoj kaj kie kaj per kia rimedo oni kaptis ĝin. Krome, oni povas ricevi du juanojn por la etikedo.

Jen estas okazaĵo kiun oni renkontis en la momento kiam sufiĉe multe da fiŝoj kun numeroj estis kaptitaj en la rivero.

ton de nova truo tipo rapide ellaboritan dum la pasinta nokto. Detale kontrolinte la tutan planon, direktoro Jaŭ ekkaptis la telefonan aŭdilon kaj donis ordonon por prepari prov-laminatadon. Tuj aktiviĝis la tuta laborejo: iuj ŝanĝis la cilindrojn, aliaj alĝustigis la truon. . . .

Ĝuste je la kvara posttagmeze, ĉiuj preparaj laboroj estis finitaj. Tuj post eksonado de interpuŝigantaj ŝtalajoj, granda ŝtalpuŝilo elpuŝis el la blanke lumanta ardiga fornego dikan krudŝtalon, kiu sin jetis kun flamoj al la impona laminatilo kaj post kelkaj iroj kaj reiroj turniĝis en longan kaj larĝan U-formon. Poste ĝi sin direktis malrapide al la malvarmigejo, kien tiam rapidis ĉiuj interpuŝe, kaj spite de la brula varmego oni mezuris la dekliniĝojn de la “du kruroj” de la nova ŝtalproduktaĵo. Fulmotondro! Tiu de “internen-kliniĝo” estis 0.8 m.m. kaj tiu de

“dors-elstariĝo” 0.6 m.m. Ili ne konformiĝis al la bezono de la traktora fabriko!

Teknika stud-kunveno surloka tuj komenciĝis. Direktoro Jaŭ kaj teknikisto Ĝaŭ gvidis la laboristojn esplori fojon post fojo la ĵus laminatitan U-ŝtalon kaj kontrolis fojon post fojo la cilindrojn kaj la truotipon. Finfine ili trovis ke la “internen-kliniĝo” estiĝis pro tio ke la kojno de la suba cilindro estas tro mallarĝa kaj la “dors-elstariĝo” pro nesufiĉo de la subenprema forto. Rebonigo estis tuj farita.

Je la sama horo de la sekvinta tago denove komenciĝis la dua prov-laminatado. La unuan fojon. La duan fojon. Kaj je la tria fojo kiam la brulruĝa U-ŝtalo elkuris el la nova muldilo, la “eksteren-kliniĝo” de la du kruroj fine reduktis ĝis 0.3 m.m. dum tiu de la “dors-elstariĝo” nur 0.35 m.m. La postuloj de la Luoĵang-a Traktora Fabriko estis ne nur atingitaj, sed eĉ multe superitaj.



Iun tagon, la partisekretario Vang en la direktoro de la konstruejo, ricevis informon, ke iu specialisto de fiŝkulturado Vu venos por interparoli kun li.

K-do Vang estis iom mirigita ke al li venos tia vizitanto. Antaŭe li ne sciis ke ekzistas ankaŭ specialisto pri fiŝkulturado, kaj eble li estus pli multe interesita, se li informiĝus kio okazis en la vilaĝoj.

La specialisto Vu estis homo malaltstatura kaj aspektis tre juna. Liaj okuloj flume brilis, kaj sin montris eksterordinare ekscitata kaj entuziasma.

“Nia digo ne estas granda, sed havas sian specialajn en tekniko; tial ĝin vizitas multaj homoj el diversaj rondoj,” la direktoro brustŝvelis kaj diris sonore. “Ankaŭ vi estas . . .”

La fiŝspecialisto lin interrompis:

“Jes, jes, mi ankaŭ volas pririgardi ĝin. Tamen ne nun. Permesu ke ni iom interparolu, ĉu bone? Kiel

vi jam scias ke ni ellasis en riveron la fiŝojn kun etiketoj. Lastatempe oni kaptis ĉi-tie multajn el tiuj fiŝoj kiujn ni enakvigis en la jaro pasinta kaj antaŭ la pasinta. Post unu aŭ du jaroj, la fiŝoj naĝas kontraŭflue ĉi tien de diversaj provincoj.”

“Kia fiŝetikedo?” k-do Vang demandis kun emociiĝo, kiun oni havas ofte ĉe renkontiĝo kun ia mirinda afero.

“Mi tuj al vi klarigos dekomence pri la fiŝetikedo,” la gasto, serĉante en la poŝo, elprenis kelke da plastikaj etiketoj kaj disdonis ilin al la ĉeestantoj, “jen ili estas. Liginte ilin al la naĝilo de fiŝoj, ni ellasis la lastajn en diversajn riverojn kaj riverpartojn por observi la vojojn laŭ kiuj naĝas kontraŭflue la fiŝoj.”

“He!” rigardante la fiŝetikedon, la direktoro ekkriis, “kiom interese! El tio montriĝas ke ĉiuj fiŝoj alvenis al nia rivero kaj faras viziton al nia konstruejo!” li ridis serene.


“Ĝuste tiel estas,” la fiŝspecialisto ridis ankaŭ, “ne malmultaj venis viziti ĉi tien. Tamen mi devas al vi rakonti dekomence. Jen, vi vidas ke mi estas esploranto pri fiŝoj. Ĉu vi ne ŝatas manĝi fiŝon? Mi supozas ke vi ŝatas.”

“Jes, tre multe. Lastatempe la bazfosajo estis senakvigita, ni ĉiuj havis fiŝojn por manĝi,” la inĝeniero Li, kiu silentis ĝis nun, kapjesis kun rideto, deprenante sian pipon.

“Kompreneble, multaj homoj ŝatas manĝi fiŝojn! La piceuso, ideluso, molitrikso kaj nobiliso estas aparte bongustaj. Mi dediĉas min speciale al studo de tiuj kvar specioj de fiŝoj dum la lastaj jaroj. Ili estas la ĉefaj specioj de ekonomiaj fiŝoj kaj estas la ĉefaj fiŝidoj, kiujn ni eksportas. Multaj el fremdaj landoj alvenas ĉiujare por aĉeti de ni la fiŝidojn en grandaj sumoj kaj transportas ilin per aeroplanoj kaj marŝipoj, ĉar estas strange ke tiuj fiŝoj metas ovojn nur en kelkaj akvoj en nia lando. La fiŝspecialistoj de la mondo studis kaj studadis, esperante ke niaj fiŝidoj povos generi en iliaj landoj, sed tute vane.”

“Jes, mi memoras, ke efektive estas tia afero. Mi eĉ vidis propraokule,” k-do Vang fervoriĝis, “iuloke de Jangzi-rivero estas ovometejo de fiŝoj. . . .”

“Jen, vi scias la aferon,” la fiŝspecialisto interrompis lin. “Tre mirinda tio ja estas. Tiu ovometejo multe prosperas ĉiujare, kaj ni pristudis ĝin. En la antikveco, ni havis tiam specialistojn pri fiŝkulturado, kiuj verkis librojn de fiŝkulturado. Multaj el niaj fiŝistoj havas valoran sperton, sed ankoraŭ ne faris resumon science por ĉerpi el ĝi sciojn kaj instruojn. Niaj sciencistoj komencis tiun studon nur post la Liberiĝo. Tre mallonga estas la studtempo. Sed ni jam solvis plurajn problemojn, inkluzive de ovometo kaj generado de tiuj kvar fiŝspecioj. Ni trovis jam la naturan leĝon de ilia sin-multobligo kaj krome ni trovis ankaŭ multe da ovometejoj en aliaj akvoj, ne sole en Jangzi-rivero.”



“Ho, vere admirinde!” diris la inĝeniero.

“Ĉu estas ovometejoj ankaŭ ĉe ni?” k-do Vang ekkomprenis kaj demandis.

“Kial ne?” la fiŝspecialisto kapjesis. “Dum la lastaj du jaroj, ni ja faris multon en esploraj laboroj, ni sciiĝis ke tiuj fiŝoj metas ovojn nur en tia akvo, kie la geografiaj kaj hidrologiaj kondiĉoj por tio konvenas. La akvonivelo, fluorapideco, akvotemperaturo, fizika kaj kemia naturoj de la akvo. . . . la kondiĉaro estas sufiĉe kompleksa. Ili jam tiel kutimiĝis al la atavismo sufiĉe stabila ke ili ne volas generi en ordinaraj lago kaj fluanta rivero.

“Simile al ni inĝenieroj!” Inĝeniero Li palpebrumis. Li aŭskultis absorbite.

“Kaj ne malpli al ni militistoj kiuj ĉiam preferas strategian lokon kia intermonto por batali.” Ankaŭ k-do Vang estis ravita kaj tuŝetis la kubuton de la malnova kunbatalanto, la direktoro per la sia.

“Laŭ la rezultato atingita per niaj fiŝetikedoj la ĉirkaŭaĵo de tiu ĉi montgorĝo estas ankaŭ fiŝovometejo. En la pasinteco, oni tion ne rimarkis, ĉar ĝi troviĝas en pliprofunda akvo, kaj ne estas tiel facile videbla, kiel tiu en Jangzi-rivero, troviĝanta en la supro de la akvo. Ni jam povas konkludi ke ĝi valoras ne malmulte en ekonomio.”

Aŭdinte tion, la direktoro pugne batis pro ĝojo sian mankavon kaj diris: “Ho, tre bele. Jen estos elektrejo supre kaj ovometejo de fiŝoj malsupre, kaj fore en la antaŭo etendiĝos la lago artefarita. . . .”

“Sed la afero ne statas tiel bele,” la fiŝspecialisto lin interrompis: “Ĉu vi ne scias, tie ĉi vi konstruas jam la riverbaraĵon kaj hidroelektrejon, kaj poste, la akvo estos entenita en la rezervejo kaj la elektrejo komencos funkcii, tiam estos ŝanĝiĝo en la hidrologio, kaj la senutila akvo de industrio estas malpura, tiel ke tiu bonega fiŝovometejo eble estos detruata?”

“Ĉu vere?” k-do Vang demandis mirigite. “Kiel povas esti?” la direktoro ankaŭ kurtiris la brovojn kaj la inĝeniero veis “A!”. Post momenta silento rekomencis k-do Vang: “Kial vi ne diris tion pli frue? Kial vi ne pripensis tian aferon, antaŭ ol ni komencis la konstruon? Ĉu vi ne jam konsideris la entreprenon de fiŝkulturado en la akvokonservejo? Jen, la baraĵo jam tiomgrade leviĝis nun, al kio utilos via alveno en la nuna momento?”

“Ne ĉagreniĝu! Sed mi devas klarigi ĝin dekomence. . . .”

“Bone, bone! diru do, dekomence, bonvolu rapidi!” k-do Vang urĝis lin ridante.

“La riverbaraĵo nepre detruos la ovometejon de fiŝoj, sed ni frontis jam plurfoje kontraŭ tiaj problemoj. Aliloke ankaŭ sin trovas baraĵoj kiuj detruas nian bonan ovometejon de fiŝoj. Ĉu mi ĵus ne diris, ke la fiŝkulturado estas juna kaj nova scienco en nia lando? La problemon de la fiŝovometejo ni trovis nur antaŭ nelonge. Tio estas alia afero ke oni konsideris pasinte la problemon de fiŝkulturado en la akvokonservejo. Nun ni ĝin studis kaj petis informon de maljunaj fiŝistoj. Ho, ili estas vere kompetentaj specialistoj. Ni jam eltrovis kontraŭrimedojn sur la bazo de iliaj sugestoj. Ni povas nun solvi tiun ĉi problemon. Tre bonefika estas la principo ‘kombino de scienca sistema teorio kun la spertriĉa praktikado de la amaso’. Hodiaŭ alveturante, mi jam faris survoje observojn en kelkaj lokoj ĉe la malsupra parto de la rivero. Kaj plifruue ni sendis iujn por fari esploron de tiu ĉi rivereto kaj trovis ke ĉe ĝia malsupra parto sin trovas kelkaj danĝeraj malprofundejoj tute konvenaj por la ovometado de fiŝoj.”


“K-do Vu, ĉu vi observis ilin ĉiujn?” k-do Vang demandis en tono tre familiara.

“Jes, mi jam ilin ĉiujn observis,” li respondis.

“Ĉu taŭgaj?”

La fiŝspecialisto ridetis: “Ni nur eksperimentas nun kaj estos necese alpreni serion da rimedoj por solvi la aferon. Ni havas iugradan certecon por sukcese translokigi la ovometejon.”

Ĉiuj ĝojegis pro liaj vortoj. Kaj ilia vana kons-terniĝo ĵus pasinta pliintimigis la rilaton inter la gasto kaj la vizitatoj. Ĝuste tiam el la megafono



eksonis malpeza muzikaĵo. Rigardante al la horloĝo, k-do Vang ekkonsciigis kiel gastiganto kaj leviĝis invitante siajn gaston kaj kunbatalantojn al manĝo. Li bedaŭris ke nenio pli bongusta estas ĉe la konstruejo por regali la gaston.

Sur la manĝotablo jam sin prezentis kelkaj bovloj da manĝaĵoj preparitaj diversmaniere el fiŝoj, kies bongustecon ili plenvoĉe laŭdis. La muziko seninterrompe sonis. La interparolado sin turnis jen al la riverbarajo jen al pli grandskala akvoutiligo en estonteco, sed tuj poste ree temis pri fiŝoj. Oni scivole demandadis, kaj la fiŝspecialisto senlace rakontis multajn aferojn pri fiŝkulturado. Lia rakontado estis tiel interesa ke ju pli longe li parolis, des pli multe ĝi kaptis la intereson de la aŭskultantoj. Li parolis pri diversaj enakvaj konstruaĵoj por fiŝoj kaj pri estontaj ŝipoj por fiŝkaptado. "Vere interesa ĝi estas! Ni projektas nun tian ŝipon kiu navigos sur la artefarita maro. Vi sciu ke malsamaj fiŝoj vivas aparte en diversaj tavoloj de la akvo. Iuj vivas en la supra akvotavolo, iuj en la pliprofunda kaj aliaj en la profunda tavolo de la akvo. Nia ŝipo ne uzos fiŝreton, sed elektron. Oni nur sendos la elektron al la akvotavolo, kie vivas tiuj fiŝoj, kiujn ni volas kapti. Ili atakite de elektro surakviĝos kun ventro supren kaj estos aŭtomate enigitaj en la internon de la ŝipo,

kie ilin prilaboros kombinita aŭtomato, sed la malgrandaĵoj ne; ili flosos sur la akvo, ĝis post tri horoj, kiam ili ree vekiĝos kaj fornaĝos. La ŝipo revenos post rondiro sur la maro. Tiam, ŝarĝaŭtoj jam atendos sur la kajo, kie oni ŝarĝos ilin per miloj da ladskatoloj de preparitaj fiŝoj kiuj estos transsendataj de rimenego kaj disportotaj al diversaj lokoj."

Aŭskultinte tion, la direktoro laŭtigis sian voĉon: "Grandioze! Tio estas kvazaŭ mito. . . ."

Sed la specialisto ne povis konsenti pri tio: "Kia mito? Ĉio ĉi estos realaĵo en ĝia plena senco!" li diris tiel serioze, ke la aliaj tri homoj ekridis.

K-do Vang ankaŭ sin esprimis: "Tio estas simpla mito!"

"Kian vivon ni kreas! La estonta vivo, kiu impresas hodiaŭ, kvazaŭ mito, eĉ pli mirinda ol mito!" Ankaŭ la inĝeniero ne povis ne tion admiri senĉese.

1. *Poeto kaj ĵurnalisto*
2. *Mylopharyngodon piceus (Richardson)*
3. *Ctenopharyngodon idellus (C. & V.)*
4. *Hypophthalmichthys molitrix (C. & V.)*
5. *Aristichthys nobilis (Richardson)*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KU

## Varmfonto sur la Tegmento de la Monto

En Ĉinio estas multaj varmaj fontoj kaj nur en Guangdong-provinco sin trovas cent dudek kvin. Sed kiu plej alte situas estas tiu sur la bordo de la Vulumusu-rivero en la Kinghaj-tibeta alt-ebenejo. Tiu loko staras 4,800 metrojn super marnivelo kaj la varmeĉo de la fonto atingas 33°C. Oni vidas tie arĝente blankajn neĝ-montojn kaj glaciejojn sur unu flanko kaj vaporigantan varman fonton sur la alia, kiuj kune formas mirindan spektaklon de la naturo.

## Unua Te-rikolto en Tibeto

Teo estas ĉiutaga necesajo por la popolo de la tibeta regiono. En la pasinteco oni transportis ĝin tien el Siĉuan, Junnan kaj aliaj provincoj. Pro longa distanco, kara transporta elspezo kaj cetere pro la akaparo kaj monopolo de

la feŭdaj mastro-sinjoroj, multaj laborantaj tibetaj popolanoj ofte ne povis havigi al si teon por trinki. Post la Liberiĝo de Tibeto la popola registaro zorgis pri la provizado de preskaŭ kelkmil tunoj da teo venigitaj el diversaj lokoj ĉiujare. Antaŭ kelkaj jaroj la registaro enportis te-ŝimojn kaj -arbidajn, kaj helpis la tibetan popolon mem kulturi te-arbojn. Kaj spertaj han-naciaj te-kulturistoj instruis al ili la teknikon de la kulturado. Nun tiuj arbidaj jam bone kreskis kaj en 1961 la tibeta popolo ĝoje ricevis sian unuan te-rikolton.

## Pli ol 700,000 Ĝuangoj Ellernis Nove Kreitan Skriban Lingvon

Inter ĉinaj naci-malplimultoĵoj la ĝuangoj nombras sin plej multe. Sed en la pasinteco ili ne havis sian propran skriban lingvon kaj pli ol 90% el ili ne sciis legi. En


1954 la registaro sendis filologistojn al ili kaj helpis ilin krei al si skriban lingvon. Rezulte de ĝia disvastigo dum la lastaj kelkaj jaroj, pli ol 700,000 ĝuangoj jam scipovis uzi tiun novan skriban lingvon.

## Scienca Diskuto en Siĉuan

En la lasta duono de la pasinta jaro la natur-sciencaj asocioj en Siĉuan-provinco vaste disvolvis siajn agadojn en diversaj formoj kaj kun variaj enhavoj, por interŝanĝi la rezultojn de esplorstudoj. Nur dum la trimestro de septembro ĝis novembro, 1961, tiuj asocioj jam nombris pli ol 120 aktivadojn. Maljunaj sciencistoj kaj junaj sciencaj laborantoj alportis al la koncernaj kunvenoj siajn disertaĵojn por diskutado. La disertaĵoj kaj raportoĵoj pri eksperimentoj, studoj kaj esploroj nur en la sferoj de agronomio kaj arkitekturo jam nombris pli ol 110.

# Sur Tero Revivigita

— Skizo pri la Popola Agrikulturejo “Cienfuegos” en Matanzas, Kubo —



Ĉinaj specialistoj pri rizkulturado pristudas rizplantadon kun estroj de la agrikulturejo. Foto de Hinhua

**A**NTAŬ nelonge, en urbeto de Matanzas, Kubo, reviviĝis vasta areo da tero, kiu pli frue estis propraĵo de terposedantoj kaj ne kulturata. Montetaj regionoj turniĝis en ebenajn kampojn, kaj marĉoj, sur kiuj neniam kreskis grenplantoj, nun fariĝis verdaj rizkampoj; tie, kie antaŭe svarmis herbaĉoj, nun staras loĝejoj de terkulturistoj kaj diversaj aliaj konstruaĵoj . . . Aperis sur ĉi tiu revivigita tero la Popola Agrikulturejo nomita per la nomo de la nacia heroo de Kubo, Camilo Cienfuegos.


Popola agrikulturejo estas unu el la tri ĉefaj formoj de agrikultura produktorganizo en Kubo. Ĝi estas agrikultura entrepreno sub ŝtata posedo “fondita en la loko, kie ne troviĝas laboristaj amasoj kaj laboras nur tre malmulte da laboristoj”. (Laŭ vortoj de Fidel Castro). En Kubo, la tero okupita de popolaj agrikulturejoj atingis jam 24.5% de la kulturita tero; en Matanzas la popolaj agrikulturejoj starigitaj en la unua serio nombriĝas dek unu.

Rapide disvolviĝas la Popola Agrikulturejo “Cienfuegos” de post sia stariĝo. En la komenco, nur 50 agrikulturaj laboristoj estis tie, inter kiuj la plejparto iam laboris sur la tereno. Nun la nombro pliiĝis ĝis 1,400.

La popola agrikulturejo estas organizajo kun multaj mastrumajoj. Unu el la ĉefaj plantajoj de la Popola Agrikulturejo “Cienfuegos” estas rizo. Ĉi tie, la tero estas fekunda kaj abunda je akvofonto, tre taŭga por rizkulturo. Tamen, la signifo de rizkulturo ne devas esti subtaksata. Antaŭe, la rizo, per kiu la

*Kiel riĉa rikolto de rizo!*

*Foto de Hinhua*



kuba popolo sin nutris, venis plejparte el eksterlandoj. Ĉi tie, same kiel en aliaj lokoj de Kubo, oni tre malofte iam antaŭe kreskigis rizplantojn. Tial, kiam vastaj rizkampoj aperis en Kubo, kia ĝojo kaj ekscito estiĝis ĉe la agrikulturistoj!

Parolante pri rizo, oni vaste interrakontas pri la amikeco inter kuba kaj ĉina popoloj. En marto 1961, grupo el sep ĉinaj specialistoj de rizkulturado alvenis trans la oceano al Kubo. Ili venis laŭ la ekonomia kunlabora kontrakto inter la du landoj por helpi kuban popolon kulturi rizon kaj akiri sperton en disvolviĝo de rizkulturado kaj pliigo de grenprodukto. Ĉi tiu specialista grupo transplantis 5 muojn da rizplantoj kaj tuj poste sukcesis eksperimente enplanti du specojn de bonkvalitaj ĉinaj rizplantoj, "Nante-45" kaj "Triumfo" sur du muoj da tero. Ili ankaŭ eksperimentis kreskigi durikoltajn rizplantojn. Sur la eksperimenta kampo de 10 hektaroj la rizplantoj kreskas tre bone. La verdaj rizplantoj altiras la atenton de preterpasantoj. La ĉinaj specialistoj laboras kune kun kubaj agrikulturaj laboristoj kiel fratoj. Kubaj terkulturistoj intime nomas la rizospeciojn el Ĉinio "semojn de amikeco".

En la popola agrikulturejo kreskas ankaŭ bananarboj kaj aliaj plantoj. La bananarboj kreskas rapide, abundas je fruktoj kaj promesas riĉan rikolton.

Sed la ĉefa tasko de la Popola Agrikulturejo "Cienfuegos" estas bredado de porkoj kaj kokoj. La

tuta Matanzas planas bredi 25,000 porkinojn. Antaŭe mankis la generaj porkoj kaj al ĉi tiu agrikulturejo estas asignita la tasko por multobligi ilin. La provinco ankaŭ entreprenas vastan bredadon de kokoj. Multprodukti kokidojn jam fariĝis unu el la gravaj taskoj de tiu agrikulturejo.

Por disvolvi la bestobredadon, la popola agrikulturejo fondis kurson por la bredistoj, kiun partoprenis ĉirkaŭ po cent junuloj kaj junulinoj.

La Popola Agrikulturejo "Cienfuegos" havas unu modernan bredejon. Tio estas konstruaĵo 400 metrojn longa, ekipita per diversaj mekanikizitaj instalaĵoj por flegi la brutaron. La konstruado de la bredejo finiĝis nur en daŭro de malpli ol tri monatoj.


Koncerne la konstruadon de la nomita popola agrikulturejo, unu afero estas notinda. Kiam oni komencis ĝin konstrui, usonaj aeroplanoj alflugis kaj faris fotojn de la loko. Iuj el la usonaj gazetoj informis, ke en Matanzas konstruiĝas raketo-bazo de Sovetunio ktp. Kompreneble, konstruiĝis tie ĉi nenia bazo por raketoj, sed loĝdomoj por la kamparaj laboristoj, oficejoj de la agrikulturejo, bredejoj kaj aliaj konstruaĵoj. Tamen, tiu ĉi ja estas ankaŭ armilo de la kuba popolo por rebati la usonajn invadantojn. Kiam la usona imperiismo provas strangoli Kubon per ekonomia blokado, la novnaskitaj popolaj agrikulturejoj faras multon en la plua disvolviĝo de agroproduktado en Kubo kaj helpas en la realigo de ekonomia sendependeco de la lando.



*Antaŭe la laboristoj de la agrikulturejo loĝis en tia kaduka domo.*

*Fotoj de Hinhua*

*Hodiaŭ ili senpage loĝas en la nove konstruitaj domoj.*



# Aĝie Ĝiasa

— Legendoj pri Princino Venĉeng en Tibeto —



Statuo de Princino Venĉeng

“ĈU estas iu en Tibeto, kiu ne scias pri Aĝie Ĝiasa? — ne, neniu. Tie, homoj, ĉu junaj, ĉu maljunaj, en rakontado pri ŝi, ne scias fini. . . .”

Aĝie Ĝiasa estas intima nomo donita de la tibeta popolo al Princino Venĉeng de Tang-dinastio, kiu edziniĝis en 641 p.K. al Reĝo Sunzankampo<sup>1</sup>. “Aĝie” signifas “fratinon” aŭ “bofratinon”, respekta titolo por virinoj kaj “Ĝiasa” signifas “internan landon” aŭ “hanon”. Tial la tuta esprimo “Aĝie Ĝiasa” signifas “Han-fratinon” aŭ “Han-princinon”.

Kaj la legendoj pri ŝi cirkulas en ĉiuj familioj tra la tuta Tibeto. Laŭ tiuj rakontoj de la tibetanoj Princino Venĉeng alportis ĉion el la interna lando — hordeo, tritiko, pizo, akvomuelilo, ŝafo, tekniko por konstrui domon kaj teksu pulu-on<sup>2</sup>. . . .

Iun tagon, ni vizitis Bu Ĝe, teksistino de pulu-o en Ŝjekaz. Ŝi tre entuziasme bonvenigis nin en la domon, kaj regalis nin per bakita hordea faruno. Ŝi diris al ni: “La semon de la hordeo alportis al ni ja Aĝie Ĝiasa antaŭ tre, tre longe.” Poste ŝi daŭrigis: “Ĉu vi scias kiel ŝi alportis ĝin?” Petoleme palpe-

brumante ŝi poste mem respondis: “Tiam, kiam Princino Venĉeng vojaĝis al Tibeto, la imperiestro malpermesis ŝin kunporti semojn; sed ŝi elpensis tre bonan rimedon kaj alportis tricent tridek specojn de semoj.” Parolante ŝi per sia fingro montris siajn okulojn, nazon, buŝon, harojn. . . . “Princino Venĉeng sciis ke mankas al la tibetanoj greno, kaj ŝi tutkore deziris alporti al Tibeto grensemojn. Ŝi do kaŝis semojn de hordeo en siaj okuloj, pizsemojn en siaj oreloj kaj legomsemojn en sia hararo. . . .” Ŝi estis tiel fervora, ke ŝi ne sciis fini.

Tiam ekster la fenestro aŭdiĝis ploro de infaneto.

“Ĉang Gjue!” ŝi vokis.

Envenis knabino ĉirkaŭ 13-14-jara. Ŝi sin vestis per longa pulu-a robo kaj ĉirkaŭ la kolumo estis ruĝa koltuko. Ŝi portis en siaj brakoj infaneton plorantan. Bu Ĝe transprenis la infaneton kaj mamnutris ĝin frapetante. Montrante ĝin ŝi feliĉe ridis: “Tiu ĉi infaneto naskiĝis lastjare, kaj estas la plej juna.” Kaj ŝi ekrakontis kiel ŝiaj gepatroj mortis dum ŝia infanaĝo, kiel ŝi vivis kun sia onklo per almozpetado, kiel ŝi portis akvon surdorse sur la monton por sia mastrosinjoro, kaj kiel tio terure premis ŝian kolon. Ŝi kolere diris, ke neniun fojon dum pli ol dudek jaroj ŝi manĝis ĝissate, kaj la kaĉo farita el bakita hordea faruno estis tiel maldensa ke en ĝi “spuguliĝis la aglo fluganta en la aero.” Post la demokrata reformo ŝi akiris teron, ŝia edzo partoprenis la interhelpan grupon, kaj ŝi mem laboras kiel puluteksistino. De tiam ili komencis vivi bone.

“Kantu por niaj kamaradoj. Kantu la kanton *Aĝie Ĝiasa teksas pulu-on*,” ŝi diris al la knabino kun ruĝa koltuko. Ĉang Gjue honteme skuis sian kapon. Nur post plurfoja peto, ŝi kantis parton de iu kanto. Kaj ŝi klarigis, ke ĉi tiu kanto estas tradiciita el la buŝo de Princino Venĉeng mem, per kiu ŝi konigis al tibetaj virinoj kiel tranĉi, purigi, kombi kaj ŝpini lanon, kaj kiel teksu la densan kaj delikatan pulu-on per ligna teksilo.

Bu Ĝe diris: “Krome Aĝie Ĝiasa alportis bovojn kaj ŝafojn al Tibeto. Ĉang Gjue, rakontu tion al niaj kamaradoj,” kaj ŝi eliris kun sia infaneto.

Komence, la knabino estis iom singena, sed baldaŭ ŝi parolis flue kaj senĉese.

“El la interna lando Princino Venĉeng alportis diversspecajn ŝafojn en multaj koloroj: ruĝaj, flavaj, blankaj, herboverdaj, ĉielbluaj, kaj ankaŭ buntaj kiaj cervoj. Ili ĉiuj aspektis tre, tre belaj. Iutage, kiam Princino Venĉeng estis pelanta la ŝafaron trans riveron, subite torento alfluis kaj forportis kun si la ŝafojn. Konsternite ŝi ekkriis: “Aj-ja! Miaj blankaj kaj nigraj ŝafoj!” Sekve nur la blankaj kaj nigraj ŝafoj transiris la riveron, dum la ceterajn kun diversaj koloroj kunportis la torento. Aĝie Ĝiasa ne povis deteni sin de plorego. . . .” La knabino rakontis tiel fervore ke ŝi eĉ imitis la ploradon kovrante siajn okulojn per la manoj. “Pli poste, oni admonis ke ŝi ne ploru, ĉar tio ja ne gravas. La lano de la nigraj ŝafoj brilas olee kaj ilia koloro neniam paliĝos. La lano de la blankaj ŝafoj estas neĝe puraj kaj povas esti kolorigataj kiel oni volas. Do ĉio estas en bona ordo. Tial, Aĝie Ĝiasa ne plu ploris. Ekde tiam, troviĝis ŝafoj en Tibeto. . . . La



“Princino Venĉeng” sur pekina scenejo.

ŝafoj de Tibeto estas aŭ blankaj aŭ nigraj, sed ne troviĝas ŝafoj diverskoloraj, kiaj ekzistas internlande. . . .”

Ni diris: “Vi tre bone rakontis!” Ŝi ridis honteme. Pridemandite de kiu ŝi aŭdis tiun rakonton, ŝi respondis:

“Eĉ mi mem ne scias. Ĉiuj tiel rakontas—la avinoj, la panjoj, kaj ankaŭ la geknaboj. . . .”

Pli poste, en aliaj lokoj ni ankaŭ aŭdis multajn rakontojn pri Princino Venĉeng.

En Lhasa, oni zorgeme konservas hodiaŭ multajn gravajn post-restaĵojn rilate al Princino Venĉeng, kaj pri tiuj estas multaj kortuŝaj legendoj kiuj radias kvazaŭ juvelo la amikecon inter la han-a kaj tibeta popoloj. Laŭdire, la Potala-palaco estis konstruita de Princino Venĉeng kaj Reĝo Sunzankampo sur la montpinto. Kiam ni vizitis la Potala-palaceton, la lamao kiu gvidis nin speciale prilumis per olelampo iun ŝtonan fornon kaj fiere diris al ni:

“Ĉi tiu forno estis uzata de Princino Venĉeng por kuiri rizon.”

Dum ni vizitis la Culakang-templon, la lamao petis nin proksimiĝi per oreloj al malgranda ŝtontruo por ke ni aŭdu la sonon de ondoj en ties interno. Laŭ legendo, Lhasa estis originale maro. Kiam Reĝo Sunzankampo decidis fondi tie la ĉefurbon, li volis pleniĝi la maron per tero, sed li malsukcesis. Tiam Princino Venĉeng ĵetis en la maron sian naŭetaĝan oran pagodeton alportitan el la interna lando, kaj poste alfaris tabulojn. Sekve, subtere de Lhasa ankoraŭ estas maro, kaj oni povas aŭdi la sonon de la ondanta marakvo.

En sia koro la tibetanoj atribuas ĉion belan kaj bonan al Princino Venĉeng. La saliko-branĉojn flirtantajn en la vento ili rigardas kiel “la harojn de Princino Venĉeng”, kaj la plenlunon sur la nokta ĉielo kiel “la rondan vizaĝon de Princino Venĉeng”. Oni ankaŭ diras, ke la ĉiutaga ornamaĵo populara inter virinoj—la lana antaŭtuko kiun oni teksas imitante la kolorojn de la ĉielarko estas heredita origine el la manoj de Princino Venĉeng.

Ne estas hazarde, ke la tibetanoj tiel respektas kaj adoras Princinon Venĉeng. Tio estas ne nur kulto al ŝi kiel individuo, sed koncentriĝa montrado de la frateco inter la popoloj de la han-a kaj tibeta nacioj en la daŭra kontakto de pli ol mil jaroj. La tibetanoj ĉiam rememoras Princinon Venĉeng kaj en ŝia persono vidas la enkorpiĝon de la amikeco inter la tibeta kaj han-a popoloj.

En Tibeto, ni ofte aŭdas la jenan popolan kanton:  
*Ĉarmas kvazaŭ flor’ knabino bela  
 en ornam’ juvela.  
 Kiu estas l’ alportinto de la gemo?  
 Estas Aĝie Ĝiasa.*

<sup>1</sup> Sunzankampo estis la reĝo de Tufanoj kiu unua unuigis Tibeton. Li fondis la ĉefurbon en Lhasa, kreis la skribon de la tibeta lingvo kaj multe kontribuis al la disvolviĝo de ekonomio kaj kulturo en Tibeto.

<sup>2</sup> Pulu-o: teksaĵo el lano kiun la tibetanoj uzas por fari vestojn.



# Liĉi-mielo

ĈIUJ floroj, birdoj, herboj kaj insektoj, kiuj indas esti pentrataj, ofte estas ankaŭ amindaj mem. Abelo estas objekto kiu plaĉas al pentristoj, tamen mi persone ne tre ŝatas ĝin. Parolante pri tio, la afero estas eble iom ridinda. Dum mia knabeco, mi foje grimpis sur arbon por deŝiri florojn. Neatendite mi estis pikita de abelo, kio tiel dolorigis min ke mi preskaŭ falis teren. Oni diris al mi, ke la abelo ne kutimas piki homon, kaj tiufoje ĝi certe miskomprenis ke mi intencas endanĝerigi ĝin. Ĉetere per piko ĝi forkonsumas sian vivon, kaj ne povos vivi longe. Pro tio mi eksentis por ĝi kompaton, kaj pardonis ĝin. Sed de tiam, ĉiufoje kiam mi vidas abelon, mi ne povis deteni min de abomeneto.

En aprilo de la pasinta jaro, veturinte al Conghua-gubernio en Guangdong-provinco mi restis por kelkaj tagoj ĉe tiea varma fonto, kie ĉirkaŭe kuŝas ĉeno da montoj kaj lageto kun printempa akvo en la sino. La pitoreske dense verda pejzaĝo estas kvazaŭ bela pentraĵo. Estis nuba vespero, kiam mi tie alvenis. Hazarde mi rigardis el la fenestro. Kiel mirinde estis, ke antaŭ la domo neatendite elstaris, vicon post vico, tiel multe da nigraj montetoj ondantaj kaj seninterrompaj.

Mi memoris ke antaŭ la domo estas ĝardeno pli malpli ebena, sed ne montoj. Kia halucino estis efektive tio? Sed kiam mi rigardis eksteren en la sekvanta mateno, mi ne povis min reteni de rideto, ĉar ili estis fakte liĉi-arboj\* kiuj staris unu apud la alia sur la kampoj, kun ege densa foliaro, sin montrante kvazaŭ montetoj dum la malluma nokto.

La liĉio eble estas la plej bongusta frukto en la mondo. Su Dongpo (1036-1101 p.K.), fama verkisto el Song-dinastio, skribis:

*Mi ne rifuzus longe vivi kiel Lingnan-ano\*\**

*Por manĝi ĉiutage po tricenton da liĉioj.*

De tio oni povas scii kiom bongusta ĝi estas. Sed bedaŭrinde mi alvenis ne en la ĝusta tempo. La liĉi-arboj estis en plena florado, sed la beleco de iliaj helflavaj floretoj ne montris sin elstara. Iliaj freŝaj folioj kun helruĝa koloro eĉ pli plaĉas ol la floroj. Videble mi ne povis ĝisatendi por gustumi la freŝajn fruktojn, ĉar de la ekflorado ĝis la rikolto de la fruktoj necesas ĉirkaŭ tri monatoj.

Sed tiam estis ĝuste la tempo por manĝi liĉi-mielon. Eble iuj ankoraŭ ne aŭdis pri tiu raraĵo. En Conghua estas maro de liĉi-arboj. Dum la florado, ĉie zumas abeloj, kiuj flugas senripoze sur la kampoj de mateno ĝis nokto. Kelkfoje ili eĉ profitas la lunlumon por suĉi la sukcon el floroj kaj produkti mielon. La specialaj trajtoj de la liĉi-mielo estas pureco de

ĝia konsisto kaj riĉeco de nutraĵo. Plejparto de la homoj, kiuj loĝas ĉe la varma fonto, ŝatas manĝi tiun mielon. Iu

afabla kamarado donacis al mi du botelojn. Tuj kiam la ŝtopilo estis deprenita, dolĉa bonodoro sin prezentis al la nazo. Miksante ĝin en duonglaso da akvo, mi trinkis kaj ekperceptis ĝian dolĉan bonodoron kun freŝa aromo, kaj la gusto tre similis al tiu de la liĉio. Trinkante tiel bonan mielon, vi sentos ke la vivo mem estas dolĉa.

Mi senkonscie emociiĝis, kaj intencis vidi la abelojn, kiuj longe ne tre plaĉis al mi.

En la mezo de la liĉi-arbaro montriĝis duonkaŝite blanka domo. Tiu estas abelbredejo de varmfonta komunumo, sed ĝi havas nomon interesan: "Abela Domego".

Estis en la plej belaj tagoj de printempo, kaj la floroj estis en sia plena pompeco. Kiam mi proksimiĝis al la "domego", mi vidis ke aroj kaj aroj da abeloj flugis jen eksteren, jen returnen, kaj jen tien, jen reen. La bolanta sceno faris la impreson ke eble ankaŭ la abeloj estis klopodantaj konstrui sian novan vivon.

Maljuna Liang, la abelbredisto, kondukis min en la "domego". Kvankam oni nomis lin maljuna Liang, li estis fakte junulo, kaj agis atenteme kaj zorgeme. Maljuna Liang, verŝajne, intencis min bone komprenigi pri la vivo de abeloj. Li singardeme malfermis la lignan abelujon, kiun dividis vico da tabuloj, sur ĉiu el kiuj troviĝis multaj abeloj malrapide rampantaj. La abelreĝino estis nigra kaj ĝia korpo estis precipe maldika kaj longa. Ĉiu abelo volonte nutris ŝin per de si kolektita flor-esenco.

Maljuna Liang diris mallaŭte kvazaŭ suspirante: "Rigardu, kiel komplezemaj estas tiuj malgrandaj estaĵoj!"

"Kiom da mielo oni povas rikolti el unu nesto da abeloj, kia ĉi-tiu?" mi demandis.

"Kelkdek ĝinojn," maljuna Liang diris. "La abelo estas la plej laborema estaĵo. La klimato en Guangdong-provinco estas bona, kaj floroj ĉiam abundas. Do la abeloj neniam estas senokupaj en ĉiuj sezonoj dum la jaro. Multe da mielo ili produktas, sed mem

\* Liĉio: tre dolĉa kaj sukplena frukto (*nephlium litchi*).

\*\* "Lingnan" estas alia nomo por Guangdong-provinco.





konsumas tre malmulte. Ĉiufoje kiam ni rikoltas mielon, ni restigas nur iom da sukero, kiom sufiĉas por ilia sinnutrado. Ili nek disputas nek protestas, sed ĉiam senĉese laboras kaj produktas mielon. Tagoj kaj monatoj pasas, ili neniam rifuzas penadon. . . .”

“Ĉu ne povas esti, ke tia bona mielo suferas de truon de ekstere?” mi demandis.

“Kial ne? Vi devas antaŭgardi la entrudiĝon de malutilaj insektoj, precipe de la granda vespo, kiu estas la plej malica kaj ofte alvenas al la aperturo de abelujo. Ĝi faras nenion krom malbono.”

Mi ekridis: “Oh, en la naturo estas ankaŭ invadisto. Kiel oni agas kontraŭ ĝi?”

“Forpeli ĝin! Se ĝi ne forflugas, ni mortbatas ĝin; sed se oni lasas ĝin tie, ĝi povas mordi abelojn ĝis morto.”

Mi subite ekhavis demandon: “Tamen kiel longe la abelo povas vivi?”

“La abelreĝino povas vivi tri jarojn, sed la laborabeloj vivas maksimume nur ses monatojn,” respondis maljuna Liang.

Vang Keming kaj Lju Guoking:

## Familio en Montvilago

**K**IAM aŭroro ruĝigis la suprajn branĉojn de arboj, ni marŝis laŭ kvietaj montvojoj al Duanmugoŭ, vilaĝo situanta tuj apud monto kaj rivereto kaj kun loĝantoj de pli ol sepdek familioj. Kvankam ni alvenis en la vilaĝon tiel frue, tamen preskaŭ ĉiuj membroj de la komunumo jam pli frue iris en la kampojn por aŭtuna rikoltado. Enirinte en la korton de Li Jongming, estro de la produkta grupo, ni tuj trovis ĝian plenan kvietecon. Tri sudaj ĉambroj staris sur la deklivo de la monto, kaj en la korto estis malgranda legomĝardeno kie estis plene plantitaj melongenoj, kapsikoj k.c. En la du anguloj de la korto estis porkostalo kaj kokejo. Onklino Tie Julan, la patrino de Li Jongming, nin salutis afable kaj samtempe daŭre enverŝis manĝaĵon en la trogon por la du grasaj porkoj. Poste ŝi iris preni maiz-branon kaj manĝorestaĵojn el la ĉambro por nutri la kokinojn. Kiam la grandaj kokinoj jam satiĝis, ŝi ellasis kaj manĝigis la kokpatrinojn kaj aron da kokidoj.

“De kie vi sukcesis akiri la necesajn nutraĵojn por tiuj kokinoj kaj du porkoj?” Kiam ni elmetis la demandon, onklino Tie viŝis al si la manojn, sidiĝis kaj ekbabilis kun ni.

“Sur nia monto estas multe da furaĝoj. Ĉiutage mi iras kolekti du-tri korbojn da verdaj vegetaĵoj kaj sovaĝaj legomoj, kaj tiujn mi miksas kun la brano

“Ja tiel mallonga estas ilia vivo. Nu, ĉu vi ne devas ĉiam forbalai la mortintajn abelojn?” mi demandis.

“Neniam,” maljuna Liang kapskuis. “Kiam ili vivas ĝis la limo, ili mortos silente ekstere, kaj neniam revenos plu.”

Mia koro nedeteneble ekstremis. Kiel aminda estas tiu malgranda insekto! Ĝi nenion postulas de la homoj, sed donas al ili tre bonan objekton. Ĝi produktas mielon, kaj samtempe ankaŭ mieligas la vivon, ne por si mem, sed por la homo! Ĝi estas malgranda insekto, sed kiel nobla ĝi estas!

Tra la liĉi-arbaro mi rigardis malproksiman kamparon meditante. Tie en la rizkampoj kamparanoj staris kaj diligente transplantadis la rizplantidojn. Ili klopodis por konstrui sian vivon, kaj en efektiveco ankaŭ por produkti mielon—la mielon de la vivo por si mem, por la aliaj, kaj ankaŭ por siaj posteuloj.

En tiu nokto mi havis strangan sonĝon. Mi sonĝis ke mi fariĝis malgranda abelo.



*Komunumanoj de Sangiang-komunumo de Gujĝoŭ-provinco ricevas premian rizon pro sia superprodukto laŭ la laborpontoj.*

*Foto de Hinhua*

Estis vere ke en la angulo de la korto estis stako da sekigitaj sovaĝaj legomoj. Onklino Tie tre fervore sciigis al ni ke ŝia familio kulturis ankaŭ pli ol duonmuon\* da private retenata tero kaj prilaboris pli ol muon da virga montdeklivo. Kaj per la rikoltita greno ili ne nur provizis sin mem, sed ankaŭ parte nutris la porkojn kaj kokinojn. Ŝi emfazis: "Sed ne neglektu tiujn kokinojn! Ili metas ovojn, kiujn ni povas vendi al la ŝtato kaj la ricevita pago sufiĉas por kovri tiajn elspezojn kiaj tiuj por la oleo, salo, pingloj kaj fadenoj por la tuta familio. Kaj ĝuste hieraŭ mi aĉetis ripan veluron por fari du parojn da ŝuo por miaj genepoj per la mono kiun mi akiris per forvendo de ovojn."

"Ĉu vi sola kapablas plenumi tiel multe da hejmaj laboroj? Ĉu tio ne malhelpas la laboron de la grupo?"

Aŭdinte ĉi tiun demandon, onklino Tie ekridis kaj tuj respondis: "Kiu familio en nia vilaĝo ne bredas porkon aŭ kokinojn? Se en la domo estas maljunulo, tiu prizorgas ilin. Se ne, oni nutras ilin mem preterire en mateno kaj vespero. Pasintjare ni vendis du grasajn porkojn al la ŝtato kaj akiris pli ol naŭdek juanojn. Krome ni kaj manĝis viandon kaj amasigis sterkon kiun ni poste vendis al la produkta grupo kaj tiel havigis al ni alian enspezon. Kaj la sterko kontribuis al bona rikolto de la grupo." Poste onklino Tie Julan ŝanĝis sian temon kaj daŭrigis: "Nun oni laboras pli fervore sur la kampoj de la grupo, ol sur sia propra tero. Prenu kiel ekzemplon mian familion! Mia filo funkciis kiel estro de la produkta grupo jam sep jarojn ekde la fondiĝo de la elementa kooperativo, kaj nun li dediĉas sian tutan koron al la grupo. Sed en la tempo kiam nia vilaĝo estis ĵus liberigita li estis ankoraŭ knabo. Tiam oni elektis min reprezentanto de malriĉaj kamparanoj. Sekve mi okupiĝis tuttage jen pri la movado de ter-reformado, jen pri organizado de virinoj por subteni la batalfronton. Jongming siatempe ofte plendis pro mia foresto de la hejmo, sed nun, li laboras eĉ pli fervore ol mi en la pasinteco. Koncerne Suking, la edzinon de Jongming, ŝi kapablas kolekti brulaĵojn sur la monto, planti kaj sarki sur la kampo kaj ventoli grenon sur draŝejo perlaborante laborpoentojn tute kiel viro. Lasttempe ŝi tiel multe sinokupas pri aŭtuna rikolto ke ŝi eĉ ne revenas hejmen tagmeze." Babilante onklino Tie senĉese laŭdatis sian laboreman bofilinon. Kiam ni demandis pri ŝia maljuna kunulo, ŝi respondis ankaŭ laŭdante: "Tiu maljunulo de nia familio suferis mizere dum duono de sia vivo antaŭ la Liberiĝo kaj liaj okuloj difektiĝis pro la longdaŭra paŝtado por la riĉulo en lia juneco. Nun li estas komisiita de la grupo kiel paŝtisto kaj li ĉiam zorgeme plenumas sian laboron. Per tio li ankaŭ enspezas plurajn laborpoentojn potage. Ĵus antaŭ kelkaj tagoj la patro, filo kaj bofilino interkonsiliĝis kaj decidis labori ankoraŭ ducent labortagojn de la aŭtuna rikolto ĝis la jarfino." Tiam ŝi demandis al ni: "Kamaradoj, nun vi povas vidi ke ili

tri estas tute okupitaj de la laboroj de la grupo, kiel mi povus postuli ilian helpon en la dommastrumado?"

Ĝuste en tiu momento, enpaŝis mezkreska, modesta, honestaspekta junulo, kunportante pioĉon en la mano, kaj tiu estis neniu alia ol la produktgrupa estro Li Jongming. Kun plena plezuro li partoprenis nian konversacion kaj nature nia temo turniĝis al la kolektiva produktado de la produkta grupo.


"Preskaŭ la tuta grundo kulturata de nia grupo konsistas el monta deklivo, kaj la tero estas sterila kaj abundas je ŝtonetoj. Laŭ la popoldiro: 'Plialtigo de terbarajo estas pli preferinda ol pligrandigo de parcelo, sed plimultigo de stal-sterko estas des pli preferinda.' En kulturado de montdekliva kampo, la rikolto dependas ĉefe de sterko." Kelkaj vortoj en la komenco jam montris ke tiu ĉi viro proksimiĝanta al mez-aĝo estas spertulo en gvidado de terkulturado. "Depost la diskutado\*\* en la pasinta jarfino, kiam la brigado fiksitis al ni la normojn de la 'tri garantioj kaj unu premio' †, estis treega granda ĉe ni la fervoro por la kolektado de sterko. Malgraŭ la frosta vintro, ĉie sur la montaro troviĝis homoj kiuj hakis brulaĵojn por fumaji sterkon. Antaŭ la plugado oni trifoje kolektis sterkon el la staloj kaj portis al la kampoj kvardek ĉevalŝarĝojn da sterko po muo kiel bazan sterkon sole."

"La produkta grupo bezonas sterkon, kaj la private retenata tero de la membroj kaj la randaj ter-

*Ĝang Vanjong, komunumanino de Nanlang-komunumo, Guangdong-provinco bredas kvar porkojn en sia hejmo.*

*Foto de Hinhua*





pecoj ankaŭ bezonas ĝin. Ĉu tio ne estigas konflikton?" mi demandis intermete.

Iom rememoriginte la grupestro respondis: "Komence ja okazis konflikto sed nia partia ĉelotio diskutis kaj faris

klarigon al la amaso ke kiam akvo troviĝas en la granda rivero, tiam pleniĝas per ĝi certe la malgrandaj riveretoj, kaj fiksis regulojn pri pago en kontanta mono por liverita sterko je prezo laŭ kvalito. Krome la grupo aranĝas ke matene kaj vespere la membroj havu tempon disponeblan por si mem, kaj fiksis regulajn feriojn en ĉiu monato. Ĉio ĉi tio multe faciligas al la membroj la prizorgadon de ilia privata produktado, kaj la grupo ankaŭ provizis la membrojn per kokidoj kaj porkidoj. Ĝuste pro tio ke la grupo multe atentis pri la intereso de la membroj, ili siavice des pli atentis pri tiuj de la kolektivo. Kaj tiel formiĝis ĉe ni la kutimo ke la sterko estas utiligata unue por la kampoj de la grupo kaj poste oni amasigas por si stal-sterkon dum libera tempo, tiel ke ambaŭ flankoj estas kontentigitaj."

Grupestro Li stariĝis, rektigis al si la talion, svingis sian manon duoncirkle en la aero kaj diris al ni kun plena konfido: "Por nia montvilaĝo la naturo estas tre favora en la kuranta jaro, la plantaĵoj en la kampoj bone kreskas kaj la akiro de premio por superigo de la produktnormo estas naŭ el dek certigita tiel ke la grupanoj laboras ĉiam pli fervore." Tiam onklino Tie ne povis sin reteni kaj intermetis: "Kaj kiu familio ne deponas monon en la kreditkooperativo en la lastaj du-tri jaroj deponst la fondiĝo de la komunumo?"

\* 1 muo = 1/15 hektaro.

\*\* La produkta plano de ĉiu produkta grupo de la komunumo povas esti decidita nur post plena diskutado de la tuta membraro de la grupo.

† "Tri garantioj" estas "garantio de produkta kvanto" (t.e. la produkta grupo devas produkti sur la de ĝi kulturata tero ne malpli ol la normon antaŭfiksitan post diskuto de la membroj); "garantio de labortagoj" (t.e. la produkta grupo devas plenumi la produktan taskon en la limo de la difinita normo de bezonataj labortagoj) kaj "garantio de produktkosto" (t.e. la produkta grupo devas produkti je kosto ne pli alta ol la difinita).

"Unu premio" estas premio por la produkta grupo kiu superplenumas sian produktan normon laŭ difinitaj labortagoj kaj produktkosto. La premio estas kalkulata laŭ la superprodukto.



Ma Gjunĝaŭ, membro de la Produkta Brigado de Higoŭ, Pingsun-gubernio, Ŝanhi-provinco vendas kokovoĵojn al proviz-venda kooperativo. Foto de Hinhua

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Medicina Eduko en Ĉinio

En Ĉinio la medicinaj edukejoj jam stariĝis ĉie tra la tuta lando. En 1960, en la altgradaj medicinaj kaj farmaciaj institutoj kaj lernejoj studis ĉirkaŭ 100,000 studentoj, dum en la mezgradaj lernejoj ĉirkaŭ 200,000. La nombro de la diplomitoj kreskas jaron post jaro, senĉese plifortigante la medicinajn kaj sanitarajn laborojn tiel en la urboj kaj vilaĝoj, kiel en la fabrikoj kaj minejoj. Samtempe institutoj de la ĉina tradicia medicino estas fonditaj en plejparto de la provincoj kaj grandaj urboj kaj eĉ en sub-

provincoj kaj gubernioj. Multaj kuracistoj de la moderna medicino ankaŭ komencis studi la ĉinan tradician kaj sekve kreiĝis bona fundamento por la scienca esploro pri kombino de la ĉina tradicia kaj okcidenta medicinoj en praktikado.


### "Verkaro de Pu Songling" kaj la Nova Eldono de "Notoj pri Mirindaĵoj de Liaŭĝaj"

Pu Songling (1630-1715 p.K.) estas unu el la grandaj literatur-

istoj de Ĉinio. Lia kolekto de mallongaj rakontoj titolita *Notoj pri Mirindaĵoj de Liaŭĝaj* estas ŝatata legajo de la ĉina popolo tra la pasintaj jarcentoj ĝis nun, sed ankoraŭ mankas kompleta eldono de liaj aliaj verkoj. Nun la Ĝonghua Librejo estas kompilanta *Verkaron de Pu Songling*, kiu entenos ĉiujn liajn verkojn ĝis nun trovitaj. Krome, tiu librejo aperigos ankaŭ novan eldonon de *Notoj pri Mirindaĵoj de Liaŭĝaj* redaktita surbaze de nove trovitaj materialoj, kiu estos pli kompleta ol ĉiuj antaŭaj eldonoj.



# Ĉaso



**L**A unuan fojon en mia vivo mi renkontis tian embarasan, sed ĝojigan aferon, kia ĉasado ĉe Kinghaj-lago.

Mi ne estas bona pafisto, nek havas specialan inklinon al ĉasado. Mi iris ĉasi nur pro la instigo de la ĉasemulo, Eta Peng.

Tiun tagon, mi kaj Eta Peng promenis kune sur la stepo, ĉiu kun "malgranda kalibro" sur la ŝultro. La stepo estis bela kaj vasta. Sur la verda tapiŝo de herboj sin paŝtis aroj da neĝblankaj ŝafoj kaj flavaj, brunaj bovoj kaj ĉevaloj, en la aero agrable kantis alaŭdoj kaj koturnoj.

Amaso da ĉevalinoj kondukata de vigla virĉevalo galopis fluge antaŭ ni.

Eta Peng diris al mi montrante la kondukantan ĉevalon:

"Tiu estas virĉevalo, fidela asistanto de la paŝtisto. Ĝi kapablas konduki la ĉevalaron, kuratingi kaj revenigi la forvagintajn ĉevalojn.

Ĝia plej bona kvalito estas tio, ke ĝi estas brava kaj lerta en batalo, kaj kapablas protekti siajn kunulojn. Kiam lupoj atakas la ĉevalojn ĝi brave kontraŭluktas kaj forpelas ilin. . . ."

Tio estas vera mirinda. Fiks-rigardante la ĉevalaron, kiu haltis en la antaŭo mi aŭskultis lian rakonton kun granda intereso.

"Jen vidu!" Eta Peng forte ektiris min, "Tie venas lupo!"

Konsternite, mi haste turnis la okulojn al la direkto. Vere! Unu granda griza lupo estis ŝtele iranta al ĉevalido, kiu ankoraŭ nenion sciis kaj trankvile manĝis herbojn kun klinita kapo. Mi retenis mian korbataĉon kaj deprenis mian "malgrandan kalibron" de sur la ŝultro. Ĝuste tiam la virĉevalo, trovinte la malamikon, ekhensis tirate kun kapo levita supren kaj la ĉevalaro tuj kolektiĝis de ĉirkaŭe. Kaj la ĉevalido tuj fuĝis en la ĉevalaron

kaj malaperis. Vane atakinte, la lupo sin turnis nun al la virĉevalo. . . . Sed tiu ĉi tute ne timiĝis. Ĝi trankvile atendis, ĝis kiam la lupo sin ĵetis antaŭen, kaj subite sin turninte, donis hufobaton al la lupo. La bato estis tiel forta, ke la lupo faris du transkapiĝojn. Regajninte la spiron, la lupo sin ĵetis refoje al la virĉevalo kiu ripete ĝin hufobatis. Je la tria fojo, la lupo jam kapturiniĝis kaj ne povis sin orienti pro la ricevitaĵoj.

"Rapidu! ekpafu, Eta Ĝaŭ!" Eta Peng frapetis min kaj flustris en urĝeco.

"Mi ne estas certa en pafo, vi venu pafi!"

"En tia proksimeco, ĉu vi ankoraŭ ne povas celtrafi! Rapidu!" Eta Peng enigis la kuglon por mi, kaj diris: "apogu la kolbon per la ŝultro, mankroĉu la ĉanon, direktu la celilon al la celgrajno, kaj la celgrajnon al la celobjekto: tri punktoj estu sur unu linio. Ek!"

Mi forte premis min al la kolbo, retenis la spiron kaj celis la lupon, kaŭrantan surtere, kaj "Pam"! mi ekpafis.

Kun la pafo la lupo falis teren kaj kuŝis senmova post kelkaj tordiĝoj.

"Trafite!" mi eksaltis pro ĝojo kaj kuris antaŭen. En la sama momento la ĉevalaro ŝajnis ankaŭ scianta ke oni helpis ilin per mortigo de la malamiko, kaj ĝoje blekante, galopis antaŭen kun la virĉevalo ĉe la kapo.

Estas tiu pafo kiu vekis mian intereson pri ĉasado, kaj Eta Peng diris, profitante la okazon por "forĝi feron dum ĝi estas ardanta":

"He! Ĉu ĉasi ne estas facile! Notu bone la punktojn, kiujn mi ĵus diris al vi, nur estu trankvila kaj vi povos akiri ĉasajon je ĉiu pafo!"

"Kien plu ni iros ĉasi?"

"Iru serĉi ĉe la lago. La birdoj de la Birda Insulo ĉiam flugas al la bordo de la lago. Unu cigno

ja pezas sep aŭ ok ĝinojn, ĝi estos pli ol sufiĉa por manĝoj de la tuta tago.”

Ni longtempe iris laŭ la lagbordo, sed nenion ni trovis. Kiam ni ĵus volis reiri ni ekvidis ĉasobjektojn. Mi kaj Eta Peng rapidis nin kaŝi en la herbaron kaj antaŭen rampis.

Grupo de sovaĝaj anseroj, cignoj kaj aliaj birdoj, estis tre proksime al ni. Kvankam ili jam vidis nin, ili tamen ne timis nin kaj ne forflugis, nur trenante siajn dikajn korpojn ili anserpaŝis tien kaj reen por serĉi manĝaĵojn tute senĝene. Kelkaj el ili eĉ swingante siajn flugilojn al ni kuretis, kvazaŭ ili bonvenigus nin.

“Rapidu!” vidante ke ili pli kaj pli alproksimiĝas ĝis nur je kelkaj metroj for de ni, Eta Peng puŝetis min kaj diris: “Pafu!”

Laŭ la maniero, kiun mi ĵus lernis, mi celis kaj pafis, kaj unu cigno falis sur la teron je la klako.

Eta Peng ankaŭ faris unu pafon, kaj la trafita sovaĝa ansero baraktis sur la herbejo.

Ni kolektis la ĉasaĵojn kaj palpis ilian dikan bruston kun granda ĝojo. “La specialan produktajon de Kinghaj-lago ni akiris!” Eta Peng diris. Sed subite aŭdiĝis krio de malproksime: “Kiu pafis?” Je kapleviĝo, ni vidis ke maljunulo pli ol kvindek jaraĝa, fluge alkuris.

Ne sciante kio okazis, ni ambaŭ ekstultiĝis. La maljunulo atingis nin kun anhelado:

“K-do, kial vi ĉasas tie ĉi?”

Lia demando mirigis nin:

“Kiel? Oni ne povias ĉasi ĉi tie?”

“Prave! Vi ne povas ĉasi ĉi tie! vidu, vi jam pafmortigis miajn cignon kaj sovaĝan anseron. . . .”

Ĉe la vortoj de la maljunulo, ni fariĝis pli konfuzitaj! Kia ridindaĵo estas, ke tiom da sovaĝaj estaĵoj de Kinghaj-lago fariĝis jam lia posedaĵo! Eta Peng moke demandis:

“Kara avo, ĉu la sovaĝaj anseroj kaj cignoj estas viaj? Ĉu vi bredas ilin?”

Aŭdinte tion, la maljunulo eksplodis per ridegoj kaj diris: “Kompreneble ili estas de mi nutrataj. Ĉu vi ne kredas? Rigardu bone: al mia voko ili respondos.”

Mi diris al mi mem, ke tio ja estas blago. Sed okazis la miraklo. Tuj kiam la maljunulo fajfis, la sovaĝaj anseroj kaj cignoj kiuj ĵus disflugis de timo, ĉiuj nun, frapante siajn flugilojn, kolektiĝis ĉirkaŭ la piedoj de la maljunulo, kaj brue blekis kun levitaj koloj. Kiam la maljunulo faris fajfon per alia tono, ili disflugis denove.

Ni estis tute surprizitaj de la fenomeno, kiu okazis antaŭ ni. Vidante nin mirigitan, la maljunulo laŭte ridis kaj diris, frapante niajn ŝultrojn: “Junuloj, nun vi estus kredintaj kaj sciintaj, kiu ilin nutras?”

Ni havas, en efektiveco, nenion por respondi. Nur post longa tempo, ni balbute al li demandis:

“Avĉjo, kiel povis esti tio ĉi?”

“Kiel? Ĉu mi ĵus ne diris, ke ilin mi bredas?”

Li levis la viktimojn de niaj pafoj dirante: “Kiu ne scias, tiu ne kulpas. Iru rigardi kun mi kaj baldaŭ vi ĉion komprenos!”

Ni iris antaŭen. Post nelonga tempo, ni atingis vilaĝeton, kiu konsistis el toltendoj kaj terkabanoj starantaj en vico. Ĉe ĝia enirejo pendis tabulo kun surskribo: “Bredejo”.

Nun ni tute komprenis, ke tie ĉi estas la loko por breedi sovaĝajn birdojn. Rememorante la vortojn kiujn ni ĵus diris al la maljunulo, ne reteneble varmiĝis niaj vangoj.

Ni vizitis la birdejon kaj kovejon kaj vidis interesajn kaj mirindajn scenojn. La aroj kaj aroj da sovaĝaj birdoj tie troviĝantaj preskaŭ inkluzivis ĉiujn specojn de birdoj de la stepo: el ili estas cignoj, sovaĝaj anasoj, sovaĝaj anseroj, turtoj kaj tetraoj. . . Ili estis vere obeemaj. Laŭ la malsamaj fajfoj, ili jen kolektiĝis jen disiĝis. La maljunulo sin konatigis al ni, ke li estas sendita de la scienca akademio por breedi la sovaĝajn birdojn, ĉar la Birda Insulo en Kinghaj-lago ja estas trezorejo, kie sin trovas divers-specaj birdaroj. Tiuj ĉi sovaĝaj birdoj estas grandkorpaj kaj viandriĉaj, sed bezonas nur simplan nutraĵon, ekzemple, la sovaĝaj anseroj pezas de 7-8 ĝinoj ĝis eĉ pli ol 10 ĝinoj, sed ili nutras sin nur per akvaj plantoj kaj sableroj, tial kapti kaj breedi ilin estas afero tre profitdona en ekonomio. . . .

“A! Maljuna k-do, do vi estas specialisto!”

“Ne gravas specialisto aŭ ne, ankaŭ tio estas nova laboro. La popolo de la tuta lando konfidas tion al mi, do mi faru la laboron! Se nur tio povas doni profiton al nia patrio, mi faros mian parton kun tiom da energio kiom mi havas!”

(Daŭrigo sur p. 38)

*Tie ĉi dom- kaj sovaĝ-anasoj amikiĝis.*






# Kunveno de Papilioj apud Lancang-rivero

**E**N Hiŝuangbanna de Junnan-provinco, la printempo daŭras kvazaŭ dum la tuta jaro. Tamen, la plej bela sezono nature restas la printempo. Ĝuste en tiu tempo, je la antaŭvespero de la Akvo-asperga Festo de la taj-oj, ni alvenis al Ganlanba, la loko konata kiel "Verda Gemo" de Hiŝuangbanna.

Surpaŝinte el boato de Lancang-rivero sur la teron dense kovritan per verdegaj vegetaĵoj, mi tuj sentis, ke ni troviĝas kvazaŭ en natura giganta ĝardeno de tropikaj vegetaĵoj. Ĉie etendiĝas densaj ombroj, pompas buntaj floroj kiel belaj brodaĵoj. Senĉese ĉirpas la birdoj, ŝajnas ke interpuŝe kreskas en konkurado diversaj plantoj sur la bruna fekunda tero. Ĉie viglas la vivo. Paŝado sur la vojetoj interligantaj la vilaĝojn donas al ni la impreson de promeno sur aleoj en zorgeme kulturita parko. Nur



*Lankiaŭ-ebeno de Hiŝuangbanna.*

tra la densdensaj foliaroj hazarde videblas la oraj punktoj de la brulanta sunbrilo.

Ni faris ekskurson tra serio da vilaĝoj laŭ Lancang-rivero. Kiam mi surpaŝis la vojeton tra la densa arbaro ĉe la rivero, mi trovis, ke ĉiu peco da tero, ĉiu parto de la vojo, ĉiu aro da arboj prezentas per si mem kolorriĉan pentraĵon de tropika pejzaĝo. Ni trapasis kelkajn vilaĝojn kaŝitajn en la profundaĵo de la arbaro. Nur post atenta serĉado ni povis vidi la belajn, delikatajn bambudomojn de la taj-oj. La vilaĝoj ĉi-tieaj estas neordinaraj. Ĉiu konsistas el loĝdomoj ne dense lokataj kune unu ĉe la alia, sed dise staras en la maro de la arbaro. Ĉirkaŭe de ĉiu bambudomo prosperas abunda kaj riĉa fruktoĝardeno. Antaŭ la korto kaj post la domo de ĉiu familio, alte kaj rekte kreskas kokosarboj kaj areko\* aŭ mangarboj kaj liĉi-


arboj\*\* verde ombrantaj la teron per siaj densaj foliaroj. Oni plantas ĉi tie bananarbojn plensarĝitajn de fruktoj por servi kiel palisaro, kaj ĉarme aromajn tuberozarbojn kiel ĉirkaŭmuro. De pampelmoj kurbigitaj branĉoj frapas la tegmentrandojn de la bambudomo. La densaj ananasoj dissendas ebriigan aromon.

En Manza kaj Manting, du ĝarden-similaj vilaĝoj, kaj la lastaj punktoj de nia ekskurso, ni pasigis tre agrablan posttagmezon. Ni vizitis la bonegan infanejon de Manza. En bela, pura manĝejo de la Komunumo ni ĝuis tipan tagmanĝon kune kun la komunumanoj laŭ la kutimo de la taj-oj, partoprenante ilian feliĉon de la riĉa vivo. En Manting, ni ĉeestis, kiel observantoj, la kunvenon de la komunum-

\* *areca catechu.*

\*\* *Nephelium litchi Camb.*

*Tie ĉi ankaŭ estas elefantoj.*




estroj en kiu oni diskutis pri aranĝo de produktado de sukeroj kaj du-rikolta rizo. Fine, kun sento de pleneco ni iris returne.

Ni laŭiris la vojjon laŭ kiu ni venis. Ĉio restis sama kiel antaŭe. Sed, ia ŝanĝiĝo tamen fariĝis ŝajne en la naturo. Fine, ni trovis la novan fenomenon, kiun ni ne vidis dum nia alveno, nome: aperis ĉe ni novaj vojkamaradoj — grupoj de papilioj. Sur floroj, inter branĉoj kaj folioj, ĉirkaŭ ni, ĉie flirtis diverskoloraj papilioj en grupetoj dancante en la vento. Iuj el ili ĉirkaŭflugis inter arboj, dum aliaj flugis antaŭen nin akompanante. Komence, ni ne tre miris pri ĉi tiu fenomeno. Ni jam informiĝis, ke nenie estas kompareble kun ĉi tie je beleco, multeco kaj diverseco de papilioj. Ĉi tie kaj en la arbaro ni ankaŭ kutimiĝis al kuniro de tiaj belkoloraj papilioj flugantaj eĉ akompane por kelkaj li-oj. Oni kutimiĝis rigardi papiliojn flirtantajn en grupoj kiel ne mankeblan parton de la natura beleco de Hiŝuangbanna.

Tamen, pli kaj pli forte ni sentis, ke la nuna fenomeno estas io ekster nia kutimiĝo kaj sperto. Ĉiam pli multe da papilioj kolektiĝis. Ili are, amase alflugis el la arbaro al la vojeto en la direkto, al kiu ni estis irantaj. Ili flugis jen supren, jen malsupren, jen dekstren, jen maldekstren; el de la floroj kaj inter arboj ŝvingis siajn kolorajn flugilojn, kaŭzante vidkonfuziĝon por la okuloj. Okaze, centoj da papilioj

baris al ni la vojjon, tiel ke ni devis ilin forpeli per vergetoj, antaŭ ol ni povis fari paŝon antaŭen.

Tiel, baraktante kontraŭ la papiliaroj, ni iris por ĉirkaŭ 5 lioj. Tiam ni ekvidis strangan spektaklon. Sur herbejo apud densa arbaro, kolosa tilio etendas siajn branĉojn kaj foliarojn, ombanta la tutan herbejon kvazaŭ giganta ombrelo. Sur la spaco de kelkcent kvadrat-futoj, meze de la herbejo kvazaŭ dense kreskanta kurioza planto, amasiĝas miloj da belaj papilioj, kiuj interpuŝas, kunteniĝas, kaj sidas unu sur la alia, formante belegan florbedon, kiu senĉese kaj rapide ŝvelas en ĉiuj dimensioj, ĉar de ĉiuj direktoj alflugadas novaj aroj da papilioj. Ili plejparte apartenas al la sama speco: la kontraŭa flanko de iliaj flugiloj estas en la koloro de malprofunda verdo, tiel ke ili similas al herbetoj kiam ili sidas senmove; la fronta flanko de la flugiloj estas orflava kun belaj desegnoj, tiel ke ili similas al etaj oraj floroj kiam ili frapas siajn flugilojn. Okaze, kvazaŭ por ornamo ilin intence, inter la papiliamason alflugas kelke da grandaj papilioj nigre kaj ruĝe striitaj kaj kun flirtantaj rubandetoj. Ni sentis nin tiumomente kvazaŭ enirintaj jam en fabelan mondon. Antaŭ ni, ĉirkaŭ nia korpo, kaj meze de la ravanta pejzaĝo de natura beleco, ĉie estas papilioj, tavolo post tavolo, grupo apud grupo. La papilioj amasiĝas en tia denseco, ke ni povis enmanigi ilin kelkajn je unu kaptu. En la



*Bananoj maturiĝis.*

aero disŝvebis poleno kvazaŭ neĝeroj, kiu, miksite kun la odoroj de sovaĝaj floroj kaj tilioj el la arbaro, agrable tiklis la nazon per forta aromo.


Ni ĉiuj preskaŭ ŝtoniĝis je la vido de tiu ĉi miriga spektaklo de la naturo. Starante inter miloj, dekmiloj da papilioj, ni sentis nin ŝajne superflujaj. Kaj la papilioj tute ne timis nin: Kiam oni ĵetis al ili branĉojn, ili tumulte disflugis en la aero, ŝvingante la multkolorajn flugilojn, sed tuj revenis al la herbejo post momento. Ni povis neniel disrompi ilian fervoron al la grandioza kunveno.

Ni longe rigardis kaj admiris la papiliojn en grupiĝo, kaj apenaŭ pensis pri foriro. En mia cerbo subite aperis tia ideo: Ĉu tiu ĉi spektaklo ne estas kiel aŭdite kunveno de papilioj? Iam oni ĉagreniĝis pro tio, ke la nombro de papilioj kunvenantaj ĉe la Papilia Fonto en Dali iom post iom malpliĝas. Sed ĉu ne ĉie sur la vasta fruktodona tero de nia belega limregiono sin trovas lokoj por ilia ĝoja renkontiĝo?



*Kiam alvenas la tempo por rikolto de kokosoj kaj ananasoj.*

# Sanatorioj en la Okcidenta Montaro de Pekino



*La Sanatorio por Azi-  
afrikaj Studentoj en  
la Okcidenta Montaro.  
Foto de Hinhua*

**E**N la okcidenta antaŭurbo de Pekino situas la Okcidenta Montaro, kie sin trovas multaj sanatorioj. La sanatorioj estas dividataj aŭ laŭ la naturo de malsano, kiel la tuberkuloza sanatorio kaj la sanatorio de ĝenerala kronikaj malsanoj, aŭ laŭ la profesioj de la pacientoj, kiel la laborista sanatorio kaj tiu por studentoj el Azio kaj Afriko. Aliaj estas nomataj laŭ la distriktoj, kie ili situas, kiel tiuj de Venkjuan (Varmfonto), Hiaŭtangŝan, Heŝanhu, ktp.

En la pasinteco, sin trovis tie ne malmulte da imperiaj palacoj kaj vilaoj de burokratoj, sed neniam sanatorio por laboruloj. La plejmulto el la nunaj sanatorioj estas nove konstruitaj kaj ili vere fariĝas belaj lokoj por resaniĝo de la vasta amaso de laboruloj.

La plej agrablaj tempoj en la sanatorioj estas la mateno kaj vespero. Tuj kiam montriĝas aŭroro, la megafonoj disaŭdigas belan muzikon, kaj oni ekzercas sin per *tajgikjuan*\* sur la terasoj kaj en la ĝardenoj. Kiam la subiranta suno ruĝigas la horizonton, la resaniĝantoj sin distras en malgrandaj grupoj, ludante ŝakon, bilardon aŭ muzikinstrumentojn. Tiuj

kiuj resaniĝis pli rapide iras fiŝhoki sur proksima riverbordo aŭ promeni en tieaj pitoreskaj lokoj.

La tempo de restado en la sanatorio kompreneble dependas de la stato de ĉiu malsanulo, sed ĝenerale daŭras duonjaron ĝis unu jaro. Ĉu oni ne sentas tedon restadante tagon post tago en la sanatorio? Ne! Kiam vi eniras la ĉambron de la resaniĝantoj, vi tuj komprenas ke ekster la tempo por kuracado ilia vivo estas varia kaj interesa. Iuj pacientoj flegas potplantojn, aliaj plektas korbojn per ulmbranĉetoj, kaj iuj el la pacientoj instruas al aliaj brodadon. Tiuj kiuj ŝatas pentrarton movas sian penikon sur papero. Ĉiuj tiuj signifoplenaj distraĵoj estas ŝatataj de la pacientoj kaj ankaŭ aprobataj de la kuracistoj. En la Laborista Sanatorio, dudekunujara laboristo Li Longbo ne nur resaniĝis de sia ftizo, sed ankaŭ ellernis, sub la permeso de la kuracisto kaj la helpo de la kunresaniĝantoj, la lastajaran kurson de algebro de mezlernejo, kaj komencis lerni la rusan lingvon. Li diris: "Mi jam loĝis en la sanatorio pli ol unu jaron, kaj neniam mi sentis ke mi apartiĝis de la ekstera mondo



# *Statuoskulpta Arto de Ĝang-familio*

“Statuoskulpta Arto de Ĝang-familio” estas kreita de Ĝang Mingŝan (1828-1906). Li kreis tiun arton kun speciala stilo, lia filo Ĝang Ĝauĵong faris novan disvolvon baze de la heredita arto.

Skulptaĵoj de la tria generacio Ĝang Ĝinghu estas pli divers-temaj kaj la prezent-formo estas pli varia. Li skulptis “Fraŭlino Hiĉun Pentras” laŭ la fama romano “Songo en Ruĝa Domo”, kiu fidel-al-vive prezentas fizionomion de la geherooj kaj delikata kaj viveca, ke la aprezantoj kvazaŭ mem vivus en la verko kaj aŭdus la parolon de la geherooj. Eĉ la vestoj kaj ornamaĵoj estigas senton de movo kaj substanco. Post la Liberiĝo, li okupiĝis en studo de skulpta arto en ŝtata art-instituto, kio plue disvolvis lian genion. Liaj novaj verkoj — nacimalplimultaj statuoj gajnis tre grandan sukceson.

La atingo de la kvara generacio Ĝang Ming kaj Ĝang Jue estas ankaŭ okulfrapa, kvankam ili estas ankoraŭ junaj en la skulptado.

Jue Fej(1103-1141 p.K. tre populare konata nacia heroo kontraŭ fremdlandaj invadantoj.) Ĝang Juting



Fraŭlino Lin Daj-  
ju kaj Gia Baŭju  
(geherooj en "Songô  
en Ruĝa Domo")  
Ŝtele Legas Mal-  
permesitan Am-  
dramon "La Okci-  
denta Ĉambro".  
Ĝang Ming





Bovpaŝtisto kaj Teksistino  
(geherooj en ĉina fabelo)  
Ĝang Juting



Longmanika Danco Ĝang Ming

Fraŭlino Hiĉun Pentras.  
Ĝang Ĝinghu



Mongolaj Gejunuloj  
Ĝang Ĝinghu



Uguraj Gedancantoj  
Ĝang Ĝinghu

aŭ malŝparis mian tempon ĉi tie. Kontraŭe, mi sentas la vivon ĉi tie riĉa kaj plena de signifo.”

La sanatorioj en la Okcidenta Montaro okupas sin ĉefe pri tuberkuloza profilaktikado kaj kuracado. Tuberkulozo regis longtempe en malnova Ĉinio, kaj ege endanĝerigis la sanon de la popolo. “El dek suferantoj de ftizo naŭ destinas al morto,” ĉiuj anoj de la maljuna generacio memoras tiun ĉi teruran proverbon. Nun la praktika vivo jam renversis tiun ĉi koncepton. En la pasintaj ses jaroj, nur en la Pekina Laborista Sanatorio 3149 pacientoj kun pulma tuberkulozo resaniĝis. Ĝoŭ Hujfang, laboristino de Guanghua Tinktura kaj Teksa Fabriko en Pekino, diris rememorante: “Kiam mi venis kiel tuberkulozulo al la sanatorio, mia koro peze sinkis. Miaj patro kaj du pliaĝaj fratoj ĉiuj mortis pro tiu ĉi malsano, kaj mi sentis ke mi mem nepre ilin sekvos. Tiam, mi ege ĉagreniĝis ĉiujfoje kiam mi kraĉis sangon.”

“Kaj nun?” mi demandis.

“Nun vi povas vidi kiel fortika mi fariĝas. Post resanigado de naŭ monatoj, ne nur la malsano estas fundamente kuracita, sed mi ankaŭ fariĝas fizike pli forta. Baldaŭ mi forlasos la sanatorion.”

Ke la pacientoj liberiĝas de la peza ŝarĝo de medicinaj elspezoj estas unu el la kaŭzoj por rapida resaniĝo. La plimulto de la resaniĝantoj ĉi tie ricevas kuracadon je elspezo de la ŝtato aŭ ĝuas laborasekuron, kaj pagas nur la manĝon. Por tiuj kiuj sin trovas en ekonomiaj malfaciloj, eĉ la manĝo povas esti senpaga. Li Longbo, la supredirita laboristo de la Elektromaŝina Fabriko en Ŝjuanvu-distrikto, devas sola vivteni siajn maljunan patrion kaj gefratojn lernantajn en lernejoj. Dum unu jaro de lia enhospitaliĝo, la fabriko daŭre pagas al li salajron ĉiumonate kaj

prizorgas lian hejmon, tiel al la vivo de tiu familio nenia grava influo estis kaŭzita de lia malsano.

La pagoj de la malmultaj mem-pagantaj pacientoj estas ne altaj. La vicestro de Venkjuan-sanatorio Su Guohi montris al ni el kontlibro ke la kostoj de enloĝo en la hospitalo, medikamento kaj manĝo senĉese malplialtiĝis dum la lastaj jaroj. En la pasinteco, kostis ĉiu lito du juanojn por ĉiu tago, kaj nun nur 30 cendojn. Frue post la Liberiĝo, unu boteleto da streptomicino kostis pli ol tri juanojn, kaj nun nur 50 ĝis 60 cendojn. Krome, tiuj kiuj ne ĝuas senpagan kuracadon ŝtatan kaj estas efektive en malfacila situacio ekonomie, povas akiri medicinan zorgon sen pago.

La sanatorio estas ankaŭ rondo de varma amikeco. Dum la vizitaj horoj ĉiutage, la atmosfero en la sanatorio fariĝas tre vigla. Alvenas la parencoj kaj amikoj de la pacientoj, la prezidantoj de iliaj sindikatoj kaj ankaŭ la ensembloj de diversaj koncernaj institucioj por konsoli, kuraĝigi kaj korvarmigi la longe suferantajn pacientojn. La amikeco inter la pacientoj, inter la medicinaj laborantoj kaj la pacientoj estas plie tre profunda. Mi havis la okazon vidi unu resaniĝinton forlasi la sanatorion. Atendas ĉe la pordo la aŭtomobilo sendita de la institucio, al kiu li apartenas, dum la kuracisto kaj flegistino pacience donas detalajn konsilojn al li kaj liaj familianoj. Liaj malsanaj kamaradoj en la sanatorio venas al li por diri adiaŭon kaj prezenti memfaritajn donacojn: peco da brodajo, korbo kaj poto kun begonio. Kaj la forironto kun subpremita emocio respondas al la konsiloj de la kuracisto kaj la demandoj de la kamaradoj kaj eliras kun senfinaj dankemo, amikeco kaj disiĝbedaŭro.

\* *Speco de ĉina korpekzercado por lertigi en luktarto.*



*Dankon al vi, ĉinaj kuracistoj!  
Foto de Hinhua*

# La Dudek Kvar Sun-periodoj

LA nuntempaj ĉinaj kalendaroj donas ne nur la datojn de la kalendaro internacie uzata, sed ankaŭ tiujn de la luna kalendaro populare adoptata en la ĉina kamparo. La luna kalendaro havas 24 sun-periodojn, kiuj formas specon de terkulturista almanako praktike valora en planado de kamplaboro.

Tre frue, en la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno (770-475 a.K.), la kvar sun-periodoj, nome: la somera kaj vintra solsticoj kaj la printempa kaj aŭtuna ekvinoksoj, jam estis enskribitaj en libroj. Dum la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-24 p.K.) ĉiuj 24 sun-periodoj jam fariĝis ekzakte kiaj nun uzataj (vidu la tabelon sur p. 31). Tiam la sun-periodoj estis uzataj nur ĉe la baseno de la Flava Rivero, la centro de la ĉina antikva civilizacio, kaj poste ili estis aplikataj tra la tutlando.

## Scienca Bazo

La formuliĝo de la sun-periodoj havis intiman rilaton kun la disvolviĝo de agrikulturo. Ĉar terkulturo intime ligiĝas kun la sezonoj, por certigi bonan rikolton diversaj kulturaj laboroj nepre devas esti farataj ĝusta-tempe. Kiam homoj trovis ke la ŝanĝo de sezonoj havas rilaton kun la suno, ili komencis apliki sian astronomian scion por determini la sun-periodojn.


La gnomono, vertikala stango almetita al horizontala surfaco iom simila al sunhorloĝo, kiu estis

iniciatita en Ĝoŭ-dinastio (1100—221 a.K.), estis la plej frua instrumento uzita por difini la sun-periodojn. Laŭ la longeco de la ombro ĵetita de la gnomona stango je la diferencaj tempoj de la jaro, antikvaj sciencistoj determinis la sun-periodojn. La tago, en kiu la ombro de la stango ĉe tagmezo estis la plej mallonga, estis fiksita kiel la somera solstico, la tempo kiam la plej longa tago kaj la plej mallonga nokto de la jaro okazas. La tago, kiam la ombro de la stango je tagmezo estis la plej longa, estis nomata la vintra solstico, kiu markas la plej longan nokton kaj la plej mallongan tagon. La du okazoj, kiam la tago kaj la nokto estis egale longaj, estis nomataj la printempa ekvinokso kaj la aŭtuna ekvinokso. La du solsticoj kaj du ekvinoksoj montras la kvar punktojn, kiam la suno brilas rekte sur la du tropikoj kaj dufoje sur la ekvatoro. Ili ankaŭ provizas la plej bonan mezurilon por determini la longecon de la sezonoj. Kun plua disvolviĝo de astronomio, oni iom post iom eksciis fiksi aliajn sun-periodojn per observado de la pozicio de la stelaroj.

La 24 sun-periodoj precize reprezentas la pozicion de la suno sur la ekliptiko (vidu la tabelon). Tiu ĉi ŝajna orbito de la suno estas dividita en 360 gradojn. Po 15 gradoj orienten formas unu sun-periodon. Ĉar la rapideco de la sun-moviĝo laŭ la ekliptiko varias je la diferencaj tempoj, sekve ankaŭ la nombro de tagoj en la sun-periodoj varias. Ekzemple, la suno iras pli rapide antaŭ kaj post la vintra solstico, tial ĉiu el la sun-periodoj cirkaŭ ĝi havas pli ol 14 tagojn; kontraŭe, je la tempo de somera solstico, la suno iras pli malrapide, tial ĉiu periodo daŭras pli ol 15 tagojn. Unu kompleta ciklo de la sun-periodoj precize egalas al la tempo, kiun la tero bezonas por rondiri unu foje ĉirkaŭ la suno, aŭ unu jaro. La diagramo (p. 30) montras la pozicion de la tero laŭ ĝia orbito ĉe ĉiu sun-periodo.

Antaŭ la difino de la sun-periodoj, ĉinaj terkulturistoj planis sian laboron sole laŭ la luna kalendaro. Iliaj monatoj estis bazitaj sur la periodo de la rondirado

Pozicio de la tero en orbito dum la 24 sun-periodoj de la jaro.




de la luno ĉirkaŭ la tero, t.e. ĉ. 29½ tagoj, sed tio pruviĝis neakurata indiko pri sezonaj kaj veteraj ŝanĝoj. La problemo estis solvita per la 24 sun-periodoj, kiuj efektive formis specon de suna kalendaro en antikva Ĉinio. La sun-periodoj povas esti kalkulataj laŭ la kalendaro internacie uzata. La 12 sun-periodoj en la unua duono de la jaro ĝenerale okazas ĉirkaŭ la 6a kaj 21a de ĉiu monato kaj la 12 sun-periodoj en la lasta duono de la jaro ĉirkaŭ la 8a kaj 23a, kun diferenco de maksimume unu aŭ du tagoj.

## Nomoj de la Sun-periodoj

La 24 sun-periodoj, ĉiu havanta apartan nomon, reprezentas la klimatajn karakterizaĵojn en Ĉinio, precipe en la baseno de la Flava Rivero. Ĉi tie musona klimato de klare distingeblaj sezonoj superregas kun malvarmaj vintroj kaj varmaj someroj. Ni jam parolis pri la signifo de kvar el la sun-periodoj,

### La dudek-kvar sun-periodoj (1961)

DATOJ	SUNAJ PERIODOJ	ZODIAKA POZICIO DE LA SUNO
Jan. 5	Modera malvarmo	Kaprikorno
Jan. 20	Malvarmego	Amforo
Feb. 4	Printempo-komenco	Amforo
Feb. 19	Printempa pluveto	Fiŝoj
Mar. 6	Insekto-vekigo	Fiŝoj
Mar. 21	Printempa ekvinokso	Ŝafo
Apr. 5	Klaro kaj brilo	Ŝafo
Apr. 20	Greno-pluvo	Taŭro
Maj. 6	Somer-komenco	Taŭro
Maj. 21	Grajn-formiĝo	Ĝemeloj
Jun. 6	Gren-spikiĝo	Ĝemeloj
Jun. 21	Somera solstico	Kankro
Jul. 7	Modera varmo	Kankro
Jul. 23	Varmego	Leono
Aŭg. 8	Aŭtun-komenco	Leono
Aŭg. 23	Varm-retiriĝo	Virgulino
Sept. 8	Blanka roso	Virgulino
Sept. 23	Aŭtuna ekvinokso	Pesilo
Okt. 8	Malvarma roso	Pesilo
Okt. 23	Prujn-falo	Skorpio
Nov. 7	Vintro-komenco	Skorpio
Nov. 22	Neĝeto	Sagitario
Dec. 7	Neĝego	Sagitario
Dec. 22	Vintra solstico	Kaprikorno



Antikva observatorio konstruita ĉirkaŭ 1279 en Dengfeng-gubernio, Henan-provinco, sur la sidejo de pli antikva observejo de Ĝoŭ-dinastio. La horizontala parto de la gnomono en la fronto de la turo estas 30 metrojn longa, sed la vertikala stango ne plu ekzistas.

la du ekvinoksoj kaj la du solsticoj. Kvar aliaj periodoj — “Printempo-komenco”, “Somer-komenco”, “Aŭtun-komenco” kaj “Vintro-komenco” — montras la komencon de la kvar sezonoj. Krome, kvin sun-periodoj indikas ŝanĝojn en temperaturo. El la 12 monatoj, januaro estas la plej malvarma kaj julio la plej varma. “Modera Malvarmo” kaj “Malvarmego” ambaŭ okazas en januaro, kaj “Modera Varmo” kaj “Varmego” en julio. Post “Aŭtun-komenco” venas “Varm-retiriĝo”, kiu montras ke la varmaj tagoj jam forpasis kaj la vetero komencas malvarmiĝi.

Sep el la sun-periodoj indikas ŝanĝojn en la humideco de la atmosfero dum la jaro. “Printempa pluveto” signifas ke iom post iom pliiĝas pluvo post la alveno de printempo. “Gren-pluvo” montras rimarkindan pliiĝon de pluvado, respondante al la bezonoj de printempaj plantaĵoj. “Blanka roso” signifas rosestiĝon dum la nokto kaj tiel la vetero malvarmiĝas. “Malvarma roso” montras ke la vetero ankoraŭ pli malvarmiĝas. “Prujn-falo” kaj “Neĝeto” signas la alvenon de prujno kaj neĝo, signoj ĉirkaŭ la komenco de vintro, dum “Neĝego” indikas ke la vintro profundiĝas.

La kvar ceteraj sun-periodoj estas nomataj rilate al terkultura aktivado kaj reago de vivantaj estaĵoj al veteraj ŝanĝoj. "Insekto-vekiĝo" indikas ke la vetero varmiĝas, tondro eksonas kaj la vintro-dorman-taj insektoj vekigās. "Klaro kaj Brilo" anoncas la alvenon de aminda dolĉa vetero kiam folioj kaj herbaro komencas ĝermi. "Grajnformiĝo" diras al ni ke estas la tempo kiam la rikoltaĵoj kreskas fortaj kaj la tritikgrajnoj pleniĝas. "Grenspikiĝo" anoncas tritik-rikolton kaj someran semadon.

## Rolo en Produktado

Multaj popolaj moroj en nia lando en la pasinteco rilatiĝis al la 24 sun-periodoj. Ekzemple, "Printempo-komenco" ekirigas kampan laboron de la jaro, kaj tiutage en antikva tempo la popolo okazigis impresan ceremonion por bonvenigi printempon. En kelkaj regionoj argilaj figuroj de terkulturisto kaj bovo estis metitaj en okulfrapa loko por rememorigi la homojn ke la printempa plugado devas tuj komenciĝi. En aliaj regionoj oni elpendigis verdajn flagojn antaŭ mateniĝo por saluti la komenciĝon de alia terkultura jaro, — verdo signifas la revenon de printempo al la tero kaj la reviviĝon de ĉiuj vivantaj estaĵoj. De post Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) virinoj tranĉis verdan silkaĵon aŭ paperon en malgrandajn flagojn, hirundojn aŭ papiliojn, metis dekduon aŭ pli unu sur alian kaj pingle fiksas ilin en sian hararon, kiel signon de bonŝanco kaj feliĉo.


Tiuj ĉi antikvaj moroj ne estas praktikataj nuntempe, sed por la ĉina terkulturisto "Printempo-komenco" ĉiam signas la komencon de terkultura aktivado en la jaro. Kiel la proverbo diras, "La plano de la jaro devas esti farata en la printempo", do la tutjara produktado devas esti planita tiutage, ebligante kulturalan laboron procedi en propraj sezonoj laŭprojekte. Sekve de "Printempo-komenco", la terkulturistoj devas pretiĝi por plugado. Sed en la lastaj jaroj en multaj regionoj terkulturistoj komencas tian preparon pli frue, kiam ankoraŭ estas vintro.

Tra la vasta lando de Ĉinio, la sezonoj ne okazas je identaj tempoj en ĉiuj regionoj. Ekzemple, kvankam "Insekto-vekiĝo" okazas ĉirkaŭ la 6an de marto, tio ne signifas ke ĉiuj insektoj en nia vasta lando vekigās el sia vintra dormo tiam, kiam la plej norda provinco-Hejlonggiang kaj norda Interna Mongolio ankoraŭ estas kovrataj de glacio kaj neĝo, dum en suda Ĉinio dika verda foliaro kaj miriadoj da floroj beligas la teron. Kvankam la vetero varias en diferencaj lokoj tiun ĉi tagon, ĝi estas en ĉiu loko pli aŭ malpli la sama de jaro al jaro. Tial, laŭ la sun-periodoj, terkulturistoj scias je kiu dato fari difinitan terkulturalan laboron. Ĝuste post la "Insekto-vekiĝo", la terkulturistoj en la sudo preparas la teron por frua rizo, semas, aplikas aldonan sterkon kaj ekstermas plag-insektojn, dum en la nordo selekto de riz-semoj kaj preparo por semado nur komenciĝas.

Dum la formuliĝo de la 24 sun-periodoj, niaj prapatroj ankaŭ elektis signojn en la kresko de plantaĵoj, kondutoj de la bestoj kaj meteorologiaj ŝanĝoj kiel markojn de la 72 subperiodoj en la jaro, kiuj suplementis la 24 sun-periodojn. Estas kvin tagoj en unu subperiodo kaj tri subperiodoj en unu sun-periodo. Ekzemple, en unu subperiodo degelado komenciĝas, en alia la hirundoj revenas kaj en tria la persikarbo ekfloras.

Estas ankaŭ scienca bazo por uzado de la 72 subperiodoj en direktado de agrikultura produkto, ĉar ĉiu subperiodo reflektas meteorologiajn ŝanĝojn en specifa maniero. Kiam la 24 sun-periodoj kaj 72 subperiodoj estas aplikataj samtempe, ili provizas tre kompletan kaj detalan gvidon por kamplaboro. Tamen, la 72 subperiodoj havas sian limitecon, ĉar ili estas tre lokecaj kaj ne povas esti praktikataj universale. Sekve, ili ne estas tiel popularaj kiel la sun-periodoj.

La 24 sun-periodoj estas unika kreaĵo de antikvaj ĉinaj sciencistoj, altvalora agro-meteorologia heredaĵo. En la pasintaj kelkaj jaroj kun fondiĝo de reto de meteorologiaj stacioj kaj veter-postenoj tra la lando, la 24 sun-periodoj estas vaste aplikataj en agro-meteorologiaj antaŭdiroj, ludante taŭgan rolon en la planado de kamplaboro.



Tiu ĉi karto montras la 24 sun-periodojn kaj 72 subperiodojn en la 12 monatoj de la luna kalendaro, kaj la kamplaborojn farendajn dum ĉiu sun-periodo. Elprenita el la eldono de 1895-a de "La Libro de Agrikulturo", verkita de Vang Ĝen en Juan-dinastio (1279-1368 p.K.).



# Vang Lanjing, la Popola Asesorino

**U**NU tagon en la komenco de aŭgusto, kiam Vang Lanjing informiĝis ke la sindikato de ŝia fabriko decidis ke ŝi pasigu siajn refreŝigajn feriojn en Bejdajhe, ŝi tuj rapidis al la sindikata vicprezidanto kaj diris: "Mi ne povas iri tien por refreŝiĝo, ĉar la distrikta popola tribunalo jam petis min ĉeesti iun juĝan kunsidon. Oni elektis min asesorino, do mi devas preni sur min la respondecon." Rimarkinte ke ŝi tiel serioze traktis la asesoran taskon, la vicprezidanto povis nur konsenti.

Vang Lanjing naskiĝis en malriĉa familio. En la aĝo de ok jaroj ŝi eklaboris kiel infanlaboristino kaj ŝi estis laborinta jam pli ol 30 jarojn. Nun ŝi okupiĝas pri la virinaj laboroj en la sindikato de la Unua Kottona Ŝpin-teksta Fabriko de Pekino kaj samtempe ankaŭ pri la laboroj de la komisiono por familianaj aferoj. En la fabriko ŝi ĉiam fervore informiĝas pri la stato de la produktado kaj laborprotektado de la laboristinoj. Ŝi ĉiam iradas al la domoj de tiuj aŭ aliaj laboristoj kaj helpas solvi ĉian ajn problemon ĉu en familia vivo aŭ en la rilatoj inter bopatrino kaj bofilino, kiun ŝi trovas. Oni laŭdis ŝin: "Vang Lanjing estas zorgema pri la kolektivaj intereso, justa, fervora kaj devkonscia en siaj laboroj." En la fino de la pasinta jaro kiam la popola tribunalo de la Caŭjang-distrikto de Pekino okazigis reelekton de asesoroj, Vang Lanjing estis enelektita.

Iun tagon dum labordejoro, ŝi ricevis leteron de la distrikta tribunalo, en kiu ŝi petis ŝin enketi la eksedziĝan proceson de Guo

Gujjing, kiu laboris en la infanĝardeno de ŝia fabriko. Vang Lanjing ne sufiĉe konatiĝis kun ŝi, sed tuj en la vespero kiam la deĵoro finiĝis, ŝi senprokraste rapidis al la hejmo de Gujjing rekte de la fabriko, kaj kun tiu ŝi parolis seninterrompe ĝis la 10-a nokte. Post kelkaj tagoj ŝi invitis ankaŭ la edzon de Guo Gujjing al sia domo por babilado. Krome ŝi vizitis ankaŭ la najbarojn de Guo Gujjing por informiĝi pri ties familia vivo. Dank' al tiu ripetita kaj profunda esplorado, ŝi finfine malkovris la veran kaŭzon kial Guo Gujjing postulis eksedziĝon. Estis la plej aĝa filo, naskita de la antaŭa edzino de ŝia edzo, kiu, hejmenreveninte de la fabriko, ofte mokis Guo Gujjing. Ŝia edzo ne rimarkis tion kaj sekve ne donis instruon al la filo kaj tiel kun la paso de la tempo, ekaperis miskompreniĝo inter la geedzoj: Guo Gujjing opiniis ke la edzo intence instigis la filon agi kontraŭ ŝi.

Eltrovinte la fakton de multaj flankoj, Vang Lanjing aktive helpis la popolan tribunalon por instrui Guo Gujjing kaj ŝian edzon kiel starigi novan familion demokratan kaj harmonian, kaj multfoje klopodis por ilin repacigi. La edzo de Guo Gujjing rekonis sian mankon kaj faris ankaŭ admonon al la plej aĝa filo.

Kiam Vang Lanjing denove vizitis la hejmon de Guo Gujjing, tiu ĝoje informis ŝin: "Nun mia edzo jam fariĝas pli bona. Kiam li revenas hejmen post laboro, li ofte helpas min prepari manĝaĵon aŭ prizorgas la infanojn. Kaj la plej aĝa filo ankaŭ ne plu tiel traktas min kiel antaŭe." Vang

Lanjing ĝoje respondis: "Mi esperas ke vi ĉiam kunvivos tiel harmonie kaj fariĝos modelo por aliaj geedzoj."

Tagoj pasis kaj Guo Gujjing ĝojplene alvenis en la domon de Vang Lanjing por speciale sendi la "ateston de repaciĝo", kiun ŝi kaj ŝia edzo kune skribis. Ŝi petis ke Vang Lanjing transdonu ĝin al la distrikta tribunalo por nuligi memvole ŝian antaŭan eksedziĝan proceson.

Depost kiam Vang Lanjing prenis sur sin la oficon de popola asesorino, ŝi ne nur aktive helpis la popolan tribunalon por la solvo de la internaj konfliktoj de la popolamaso, sed ankaŭ samtempe meminciate okupiĝas pri propagando kaj edukado inter la oficistoj, laboristoj kaj iliaj familianoj. Surbaze de observado en siaj ĉiutagaj laboroj, ŝi konstatis ke la familiaj konfliktoj okazas plejparte rezulte de malakordiĝo inter la bopatrino kaj bofilino aŭ de malbona aranĝo de hejma vivo. Pro tio ŝi kelkfoje kunsidis kun la familianoj en sia libertempo, kaj per konkretaj ekzemploj ŝi al ili klarigis ke la junaj virinoj devas estimi la maljunulojn kaj la bogepatroj siavice ankaŭ devas konsideri la malfacilojn de siaj filoj kaj bofilinoj, kaj nur tiamaniere oni povas fondi feliĉan kaj harmonian novan familion. Ĝuste dank' al ŝia pacienca helpado la familia vivo de laboristino Jaŭ Siufang fariĝis fine harmonia. Ŝi ankaŭ ofte faris inter la familianoj propagandon pri la bonaj ekzemploj de diligentemo kaj ŝparemo kaj eĉ mem iris helpi la nespertulojn aranĝi sian ĉiutagan vivon kaj realigi laŭplanan elspezadon surbaze de ŝparado kaj laboremo.

---

## Korekto

En la legado bonvolu interŝanĝi la lokojn de la klarigoj de la 2-a kaj 3-a bildoj sur p. 258, n-ro 6, 1961

---

# "Granda Ŝanĝiĝo de la Flava Rivero"

— *Pri la dokumenta filmo* —

*Granda Ŝanĝiĝo de la Flava Rivero* estas grandtipa kolora dokumenta filmo pri la konstruado de la akvorezervejo de Sanmen-gorĝo. Ĝi estas streĉe komponita epopeo prikantanta la heroan popolon de Ĉinio.

Tuj en sia unua bildo la filmo prezentis al ni la ruliĝantajn kotajn ondegojn de la Flava Rivero, kiu torentas muĝante kaj serpentumante malsupren de sur la ĉielo, trakurinte historion de Ĉinio kaj alportinte al la ĉina popolo grandegajn katastrofojn, kiuj estis tiel multnombraj kiel la eventoj de la historio, ke oni ne scias de kie komenci rakonti pri ili.

Sed sur la bordoj de la Flava Rivero embriiĝis la malnova eminenta kulturo de Ĉinio. Niaj praavoj naskiĝis, loĝadis kaj generadis tie. La popolo timis la riveregon, kaj tamen ankaŭ ĝin amis. Veturante sur ĝiaj furiozantaj ondoj per balancantaj ledvezikaj flosoj, ili dolore sopiradis: "Kiam, ho, kiam ni povos ĝin

konkeri kaj subjungi, ŝanĝi ĝian kotan torenton en bluan fluon, ke ĝia riĉa akvo irigaciu por ni milionojn da muoj da tero kaj ebligu navigadon al niaj miloj kaj miloj da ŝipoj kaj boatoj?" Tion kore deziris la popolo, kaj bruligante incenson preĝadis dum miloj da jaroj por ĝia efektivigo. "Klariĝos la Flava Rivero, kiam aperos 'saĝulo'—ili metis sian esperon sur la malforta apero de saĝulo". La popolo ne bone sin konis antaŭ kiam la Komunista Partio ĝin ekgvidis, ĝi ne sciis ke kiam ĝi unuiĝas kaj ekagadas, ĝi havas forton centoble kaj miloble pli grandan ol tiu de la sovaĝa Flava Rivero.

La Flava Rivero enfluis en la epokon de la popolo—la heroa popolo ekstariĝis kaj komencis reordigi siajn malnovajn montojn kaj riverojn. Depost Prezidanto Maŭ persone venis esplori sur la bordo de la Flava Rivero, komenciĝis streĉaj kaj atentemaj laboroj, pri kiuj la filmo faris vivan prezentadon.

Printempe de la jaro 1959, mi vizitis la konstruejon de la pivota akvomastruma projekto de Sanmen-gorĝo. Nun vidante ĉiun el la bildoj de la filmo, mi ekmemoris nedeteneble kun varma sento en la koro multegon da homoj, kontribuintaj al la grandioza projekto per siaj saĝo kaj fortoj, kiujn mi persone vidis aŭ pri kiuj mi aŭdis.



Kiam mi vidis la laboristojn de la tri herojaj brigadoj de betono, lignomuldilo kaj ferskeleto streĉe batalantaj en pluvo kaj neĝo spite al la kruela vetero, mi ekmemoris la iam de mi priskribitan *Sanmen-gorĝo—Urbon de Mirindajoj*, kie dekmiloj da kamparanoj, komercaj kaj medicinaj laborantoj, instruistoj, vartistoj, aktoroj ktp. diligente laboregis por garantii glatan iradon de iliaj laboroj kaj ilian bonstaton same kiel la verdaj folioj de peonio plibeligas ĝiajn florojn.

Kiam mi ekvidis sur la ekrano la alte starantajn turojn de la

*La Flava Rivero estos barita.*

*Ili subjungas la furiozan Flavan Riveron.*

*Ĝi liveros fortan kurenton.*



kabloorgano, la longajn rubando-transportilojn de ovosimilaj ŝtone-  
toj, la kolosajn betonmetajn  
sitelegojn, kluzpordegojn . . . kaj  
la tunelo-similajn ŝtaltubegojn  
akvokondukajn, mi ekmemoris pri  
la streĉa laborado de la laboristaj  
fratoj, kiujn mi vidis en diversaj  
ŝtalfabrikejoj tra la lando. En  
ŝtaluzino en la malproksima Le-  
ningrado, iu sovetunia laboristo  
diris al ni kun rideto, fiere fra-  
pante grandegan hidraŭlikan tur-  
binon: "Jen estas produktaĵo urĝe  
farita por la akvokonserva pro-  
jekto de la Flava Rivero en  
Ĉinio." Tiam mi estis tre kortu-  
ŝita, ke ne nur pli ol 50 urboj  
enlandaj, sed ankaŭ Sovetunio kaj  
aliaj frataj landoj partoprenis per  
tintantaj ŝtaloj la grandiozan  
simfonion de socialisma kunlaboro  
por nia konstruado ĉe Sanmen-  
gorĝo.

Kiam mi vidis sur la vasta  
konstruejo, krom la alte starantaj  
krutaj bordoj kaj torentanta  
kotakvo, nur la rapide moviĝan-  
tajn rubandojn de la transportiloj,  
la arganojn kun malrapide supren-  
malsupren moviĝantaj ŝtalbrakoj,  
kaj la ĉenojn da vagonaroj kaj  
ŝarĝaŭtoj rapidantaj, kiam ne  
multaj laboristoj estis videblaj,  
krom nur denove kaj denove  
maŝinoj, mi tamen bone sciis, ke  
sur la konstruejo kun larĝeco kaj  
longeco de dekoj da lioj, multaj  
helpaj labor-bazoj situantaj supre  
kaj malsupre, proksime kaj mal-

*Adiaŭ al la hejmloko kaj la kons-  
truantoj de la akvorezervejo por  
veturo al la novaj loĝejoj.*

proksime en la ĉirkaŭaĵo, estas  
liverantaj sub direktado per tele-  
fono la bezonatan sangon, kiel la  
vejnoj al la koro de giganto.




Kiam mi vidis ke la kamparanoj  
de la 13 gubernioj en la tereno  
de la aperonta artefarita lago  
ascendis kun siaj junaj kaj mal-  
junaj familianoj vicojn da vetu-  
riloj ĝoje tenante portretojn de  
Prezidanto Maŭ kaj ekveturis  
kunportante siajn meblojn inter  
du vicojn da diverskoloraj flagoj  
akompanate de gaja muziko al  
siaj novaj loĝejoj, mi pensis, ke  
ekde nun ili ne nur havos novajn  
loĝejoj en loko pli oportuna, sed  
ankaŭ povos ĝui ĉe siaj loĝejoj  
la ŝatatajn antikvajn kulturajn  
restaĵojn Tongguan-pasejon, Jong-  
luo-palacon k.a., kiuj estas jam  
tie rekonstruitaj. Krome, mi in-  
formiĝis pri tio, ke ankaŭ la  
jubilatoj de Linbaŭ, kies fruk-  
tojn ili tre ŝatas, estas trans-  
plantitaj sur la altaj distriktoj  
jam antaŭ longe. Postlasitaj de  
ili estas nur la multjaraj mizeroj  
kaj kunportitaj estas iliaj "tre-  
zoroj de la familio". Tiam mi  
ekmemoris kun rideto pri la  
peonioj kaj siringoj, kiujn mi  
vidis ĝue en la korto de la kons-  
trueva administracio. Tiutage,  
tiuj floroj ravis min per ekster-  
ordinare brilaj koloroj kaj pom-  
peco en mia ĝojo. Kompreneble,  
ankaŭ ili estas jam transportitaj  
supren sur la lagbordon, kaj eble  
nun ili dance balancas en la

*Estonte, la akvo de la akvore-  
zervejo turnos tra tiu giganta tubo  
turbinton de la elektrostacio.*

giganta spegulo de la klara kaj  
blua lago!

La blua akvo de la artefarita  
lago, kiu estas fakte pli vasta ol  
la natura lago Tajhu kiu famiĝas  
per sia nominala surfaco de  
240,000 hektaroj, ondetas ĉe vento  
kaj samkoloras kun la ĉiela la-  
zuro. La grandioza riverbarajo  
de la pivota akvomastroma pro-  
jekto de Sanmen-gorĝo speguliĝas  
en la lago forte impresante per  
sia okulfrapa koloseco. La Flava  
Rivero enfluis en la epokon de la  
popolo, kaj la sonĝo de jarmiloj  
estas iom post iom efektiviĝanta!  
En la akvorezervejo ampleksanta  
pli ol 2 300 kvadratajn kilometrojn  
akumuliĝis ne akvo, sed la fortoj  
kaj saĝo de la sennombraj sufer-  
rintaj sed nun jam liberigitaj po-  
polanoj tra la tuta lando. Kiel  
oni povus ne kortuŝiĝi, kiam oni  
ekvidas, ke la Flava Rivero kiu  
torentis dum miloj da jaroj kun-  
portante amasegon da koto jam  
fariĝis blua fluo kviete ondanta?

*La riverbarajo jam leviĝas.*



# Faden-Marioneta Ludo de Kjuangōū



“Badaĉuj batalas kontraŭ Lu Venlong”

**M**ARIONETA LUDO ekzistas en Ĉinio jam pli ol mil jarojn. En diversaj lokoj tra la tuta lando ĝi prospere disfloras kun mal-samaj koloroj kaj aromoj.

La faden-marioneta ludo de Kjuangōū estas unu el la ĉefaj specoj de teatarto en la suda parto de Fugian-provinco. La vizaĝoj de tiuj marionetoj multe similas al tiuj kiujn ni vidas ĉe homfiguroj en la pentraĵoj el Tang-dinastio. Ili estas karakterizataj per grasetaj vangoj, delikataj brovoj kaj okuloj, altaj hartuberoj kaj plate algluiĝintaj tempiharoj. Ĉiu figuro havas sian propran mienon kaj okulfrapan sentesprimon konforme al sia karaktero. Tial ĝi estas aktoro

Li He (791-817 p.K.):

## *La Distriktestro de Janmen\**

Disfalus la remparo sub la pez' de nubamas'.  
Kontraŭ l' sunflamo kiel skvamoj flagras la kiras'.  
Aŭtuna firmament' resonas de blovado korna,  
Kaj la landlim' droniĝas en vesper-purpuro morna.  
Marŝo al I-ŝuj\*\* kun duonvolvita ruĝa flag'.  
Frostego. Densa prujno. Raŭkas la tambura brak'.  
Pro la donata al mi en via korteg' favoro,  
Spado en man,' mi paŝas al la morto kun bonvolo.

\* La poeto prunteprenis la titolon de malnova kanto por kanti pri imagita heroo militisto.

\*\* I-ŝuj: I-rivero, en Hebej-provinco.

Caŭ Ĝi (192-232 p.K.):

## *Kanto pri Pasero en la Kampo*

Fajfanta vent' turmentas altajn arbojn,  
Kaj ondojn ĉiam rulas vasta maro:  
Se brila spad' ne estas en la mano,  
Helpon atentos vane amikaro.  
Jen heĝ-pasero, nizon ekvidante,  
Malvole ĵetas sin en birdoreton.  
La birdkaptisto ĝojas pri l' kaptajo,  
Sed juna hom' kompatas la birdeton,  
Eltiras spadon kaj la reton frapas:  
Tuj la pasero el la ret' eskapas.  
Ĝi flugas rekte en ĉiel-lazuron,  
Sed redescendas danki la junulon.

Tradukis S. J. Zee

sur scenejo, kaj reliefa homfigura pentraĵo kiam ĝi estas pendigita sur muro.

Estas tre multaj famaj marionetludantoj en Kjuanĝoŭ. Ili heredas sian arton de generacio al generacio kaj havas respektive siajn specialajn distingajojn. Ili posedas krom la fundamentajn teknikojn karakterizitajn per "firmeco", "ĝusteco", "lerteco" kaj "majstreco" ankaŭ sian apartan eminentan kompetentecon por certaj roloj. Ekzemple, la fama majstro Hie Ĝenhiang plej lerte ludigas la rolon de virino. Direktante la marioneton per kelkdek fadenoj li povas vivece esprimi la ĉarmon de milda moviĝo de virinoj kaj ankaŭ la fortecon en luktado per sabro aŭ spado.



"Jue Fej" (vidu p. 25)


La dialogoj de la marionetaj teatraĵoj de Kjuanĝoŭ estas elegantaj kaj humoraj kaj la melodioj de iliaj kantoj estas esprimriĉaj. La dekoracio kune kun la lumigado donas efikon de lupeo. Dank' al tio la sursceniĝita marioneto nur du futojn alta sin montras kiel se ĝi estus vera homo, kaj tiu iluziiga maniero multe ravas la spektatorojn.

La delikateco de la moviĝoj de la marionetoj dependas ĉefe de

la nombro de la tirfadenoj kaj la strukturo de iliaj artikoj. La marionetoj de Kjuanĝoŭ ĝenerale havas 15 ĝis 26 fadenojn. Se ili estas ludataj kun bestoj (ekz-e, sur ĉevalo), tiam necesas 28 aŭ 29 fadenoj. Krome oni faras multajn marionetojn kun malsamaj artikoj ne nur laŭ diversaj roloj sed ankaŭ laŭ diversaj karakteroj kaj laŭ la evoluiĝo de la intrigo, por respondi al la bezonoj de esprimado. Ekz-e en la dramo *Inundo de Ĝin-monto* oni havas tri marionetojn por roli la spiriton de blanka serpento, unu kiel ordinara virino, alia kun glavo kaj la tria kun lanco en mano. Ĉiu marionetodirektisto ankaŭ ŝparas nenian penon en sinekzercado. Unue li ellernas la plej malfacile lerneblan arton de "irigo". Pere de tirfadenoj kaj speciale faritaj artikoj la direktistoj prezentas la iradon tiel vivece ke la spektatoroj neniam vidas la marionetojn enaerigitaj aŭ oblikvigigitaj en paŝado ĉu malrapida aŭ hasta. En la nomita dramo oni povas vidi ankaŭ spektaklojn de remado, inter-

batalo, elingigo de spado, lukto en akvo, salto en aeron, tenado de standardo fare de testudo, arkpafado fare de omaro, svingado de glavo fare de litorino, elkiras-iĝo de kankro kaj rajdo sur testudo de miĉulo. Kaj krome la aparte interesaj estas la agoj de pordofermo, kapoelŝoviĝo kaj surpaŝo de ŝtuparo fare de bonzeto. En la dramo *Celebro de Abunda Rikolto* oni povas vidi la mirindajn spektaklojn de ĉarveturigo, vektoportado, sarko, aspergo de vera akvo kaj fumado kun vera fumo. Kaj en la dramo *Liberigo de la Insulo Jigiangŝan* oni povas vidi scenojn kvazaŭ sur vera batalkampo: ŝvebante falantajn paraŝutojn, furiozantajn mar-ondegojn, plonĝantajn aeroplanojn, rapidveturantajn militŝipojn, senĉesan bombardon kaj vualiĝon de la sceno per pulvo-fumo. En la dramo *Leciono por Maldiligenta Kato* oni povas vidi la interesajn scenojn de la stetoskopado de d-ro Bovo kaj la injektado de flegistino Ansero, kio ĉiam igas la infanspektatorojn ridegi, ĝis ne povante sin rektigi.

La marionet-ludantoj tiel ludas.



# Ĉevalrajdaj Sportoj en Nova Ĉinio

**Ĉ**ĈEVALRAJDO estas tradicia sporto de la ĉina popolo. Ekde la Liberiĝo de Ĉinio en 1949, ĉevalrajdo brile disvolviĝas dank' al la kuraĝigo de la Ĉina Kompartio kaj la Popola Registaro.

Ĉi tiu disvolvo speciale evidentiĝas en la landlimaj regionoj loĝataj de la nacimalplimulto.

En tiuj regionoj la loĝantaro plimultiĝas kaj bruto-bredado prosperas ekde la Liberiĝo, rezulte de la brila politiko pri nacioj de la Ĉina Kompartio. Okaze de festoj, granda nombro da kamparanoj kaj bredistoj celebras, kolektiĝante por partopreni en la ĉevalrajdaj prezentoj kaj konkursoj.

Ĉevalrajdo estis unu el la programeroj spektitaj en la Sporta Kunveno de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en 1952 kaj la Nacia Tradicia Sporta Kunveno en 1953. Ĉi tiu sporto estas tre populara en la Popola Liberiga Armeo kaj en la regionoj de Interna Mongolio kaj Hingiang.

En la jaro 1958, kiam la ĉina popolo progresis per granda antaŭensalto en ĉiuj kampoj de laboro, popolaj komunumoj stariĝis en la regionoj kamparaj kaj paŝtaj, kaŭzante grandan disvolvovon en terkulturado kaj bruto-bredado. Kelkaj belaj geneologiaj rasoj kiaj la "Sanho-a ĉevalo" kaj "Mongolia ĉevalo" de Interna Mongolio kaj la "Ili-a ĉevalo" de Hingiang estas breditaj grandnombro. Tio faris siavice tre favorajn kondiĉojn por la disvolviĝo de ĉevalrajdaj sportoj en Ĉinio.

En la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, la Ujgur-a

*Ĉevalhokeo postulas tre altan rajdarton.*



*(Daŭrigo de p. 21)*

"Ĉu tiuj sovaĝaj birdoj kaptite povas esti facile bredataj?" Eta Peng demandis.

"Jes, pli facile bredeblaj estas birdidoj ĵus elkovitaj, kiujn oni ricevas ĉefe de elkovado per ovo. Ni kolektas la ovojn de la Birda Insulo, el kiuj ni elektas la bonajn por elkovado artefara aŭ perelektra, kaj liveras la restajn nealte valorajn al la bazaro kiel nutraĵon. La birdidoj elkovitaĵas estas tre obeemaj post dresado.

La maljunulo montris al ni la lagon kaj diris:

"Vidu, nia boato por kolekti birdovojn jam revenas!"

Ni rigardis ĝis la ekstremeco sur la senfinan verdan ondaron kaj vidis ke unu boato balancante venis reme al ni. En la boato kantis knabinoj. La kanto ne sonis alte, sed tre klare:



*Blua estas l' akvo kaj lazura la ĉielo,  
Etendiĝas la senfina verda stepo,  
Per boato ni veturis al la Birdinsulo,  
Pleniĝas revene la boato de birdovoj  
He . . . .*

*Pleniĝas revene la boato de birdovoj. . . . .*

La maljunulo regalis nin per abunda vespermanĝo. Kiam ni adiaŭis lin, li eĉ devigis nin kunporti la du birdojn, kiujn ni mortpafis. Kinghaj-lago estis tiel bela en la vespera krepusko, la akvo rebrilis en la ruĝo de la subiranta suno, kvazaŭ belbrila brokato. Mi kaj Eta Peng surŝultriginte la pafilojn, cignon kaj sovaĝan anseron, paŝis ŝanceliĝe sur la herbejo. Mi sentis, ne sciante pro kio, ke la cigno sur mia dorso multe pezas, kaj mi longe sentis bedaŭron al ĝi en mia koro. Mi rigardis malantaŭen, Eta Peng ankaŭ paŝis kun klinita kapo. Versajne, li estis ankaŭ pensanta pri la okazaĵo de tiu posttagmezo!

La unuafoja en mia vivo ĉasado multe embarasis min, sed ankaŭ tre ĝojigis min. Ĉiam kiam mi rememoras ĝin, mi ekridas honteme.

Aŭtonoma Regiono de Hingiang kaj aliaj regionoj, kie ĉevalkonkursado estas tradicia, ĉevalrajdo vaste populariĝis en multaj gubernioj, popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj.

La ĉevalrajdaj ĉampionecoj de la Landa Sportkunveno en 1959 kaj la Ĉevalrajdaj Sportoj kaj Poloaj Ĉampionecoj en 1960 estis elstaraj ekzemploj de la rapida disvolvo kaj popularigo de ĉevalrajdo en Ĉinio. Ĉe la ĉampionecoj de Ĉevalrajdaj Sportoj okazigitaj en septembro, 1960, la marborda urbo Ŝanhajo unuafoje aperis por konkuri kune kun Interna Mongolio, Hingiang, Kinghaj kaj ceteraj regionoj de tradicia ĉevalkonkursado. La programeroj pliiĝis nombre de dek unu ĝis dudek kvar, kaj la nivelo de prezentado estis plialta ol iam ajn antaŭe. Ĉio ĉi estas klara pruvo de la impulsado donita al la progresado de ĉevalrajdaj sportoj de la rapida disvolviĝo de bruto-bredado rezulte de la movado de popola komunumo.

Alia interesa ekzemplo kiu montras kiel ĉi tiuj sportoj atingis tian rapidan kreskon en Ĉinio,


estas ilustrita per la rakonto pri Dolema, 13-jara knabino-rajdanto el Interna Mongolio. -

Dolema estas filino de paŝtisto, ŝia familio estis ekstreme malriĉa antaŭ la Liberiĝo. Ŝiaj gepatroj havis dek du infanojn, sed ne povis vivteni ilin ĉiujn, kaj volevole fordonis ses el la dekduo. Juna Dolema naskiĝis en 1947, la jaro kiam la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estis fondita post la Liberiĝo de tiu regiono. Ŝi havis feliĉan infanecon, kreskante sub la varma zorgo de la Ĉina Kompartio, kaj estis la unua membro de sia familio, kiu iras al lernejo.

Ĉe la Landa Sportkunveno en 1959, ŝi renkontis Prezidanton Maŭ Zedong, la granda gvidanto de ĉiuj nacioj en Ĉinio. Ŝi estis tiel kortuŝita ke ŝi ploris.

Kuraĝigite de la Ĉina Kompartio, ŝi persistis en peniga ekzercado en ĉevalrajdo post siaj lernejoj. Ŝia klopodo estis fine kronita per sukceso kiam ŝi renovigis la landajn rekordojn por la virina 1,000- kaj 2,000-metra ĉevalkonkursado kvarfoje en la Landa Ĉampionec-turniro

de Ĉevalrajdaj Sportoj kaj la Regiona Ĉampionec-turniro de Interna Mongolio en 1960. Tute ekscitite ŝi diris: "Kiel feliĉa mi estas vivante en la epoko de Maŭ Zedong!"



*Sportistoj trejnas ĉevalojn per barajtranssalto sen rajdanto.*

Ĵus eldonitaj

**Maŭ Zedong:**

**Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio**

**Laŭdezira Kalkulo de Kennedy**

Libreto pri la parolo de Kennedy kun Aleksej Adĵubej kaj la kalumnio kontraŭ Ĉinio de Stevensen en UNO.

***Mendu ĉe Administracio de ĈEL (P.O. Kesto 313, Pekino) aŭ ĉe niaj laudaj perantoj***



En la n-ro 2 de 1958 de nia gazeto ni aperigis artikolon pri tiu ĉi temo. Ĝi vekis grandan intereson inter niaj legantoj. Multaj skribis al ni por informiĝi pri tiu ludo pli detale. Pro tio ni petis la aŭtoron verki tiucele por niaj legantoj serion da artikoloj pri tiu temo kaj ilin aperigos sinsekve en nia gazeto. Por ke niaj novaj legantoj povu same bone kompreni la artikolojn la aŭtoro nun komencas la serion per la jena artikolo.

— La Red.

# Fundamentaj Reguloj de la Ĉina Ŝako

La ĉina ŝako estas ludata de du rivaloj. Unu disponas la nigrajn ŝakdisketojn kaj la alia, la ruĝajn. La movoj estas farataj alterne, komencate de la nigra flanko. La celo de la ludo estas sama kiel la internacia ŝako: matigi la generalon aŭ marŝalon de la rivalo aŭ devigi la rivalon cedi antaŭ tre malfavora situacio.

## La Ŝaktabulo

La ĉina ŝaktabulo estas formita el 10 horizontalaj kaj 9 vertikalaj paralelaj linioj egale interspacigitaj, kiuj intertuŝiĝas sur 90 punktoj (bildo 1). La 7 internaj vertikalaj linioj rompiĝas inter la horizontalaj d- kaj e-linioj. La spaco el tio formita estas nomata "lim-rivero", kiu apartigas la areon de la malamika flanko dis de la propra. Meze ĉe la fundo de la areo de ambaŭ flankoj troviĝas la palaco, kiu estas markita per du interkruciĝantaj diagonaloj, kiuj tuŝas po 3 samajn vertikalajn kaj horizontalajn liniojn. Tiu ok trianguloj kun 9 tuŝpunktoj formas la terenon de la palaco.

## La Ŝakdisketoj

Ĉiu ludanto disponas 16 ŝakdisketojn. Ili estas lokataj sur kaj movataj de unu al alia punktoj sur la linioj, sed ne en la kvadratoj.

La 16 disketoj de ĉiu flanko estas dividitaj en 7 specoj, distingitaj per ĉinaj ideografiaj (por faciligi la memoron de la legantoj, en la bildoj ni aldonis esperantajn mallongigojn) sur la disketoj. Ili estas:

### La nigra flanko


- 1 将 (Generalo — G)
- 2 士 (Eskortantoj — Es)
- 2 象 (Elefantoj — El)
- 2 車 (Ĉaroj — Ĉa)
- 2 馬 (Ĉevaloj — Ĉe)
- 2 炮 (Kanonoj — K)
- 5 卒 (Peonoj — P)

### La ruĝa flanko

- 1 帥 (Marŝalo — Ma)
- 2 士 (Eskortantoj — Es)
- 2 相 (Ministroj — Mi)
- 2 車 (Ĉaroj — Ĉa)
- 2 馬 (Ĉevaloj — Ĉe)
- 2 炮 (Kanonoj — K)
- 5 兵 (Soldatoj — S)

La bildo 1 montras la poziciojn okupitajn de la diversaj disketoj antaŭ la komenciĝo de la ludo.

Bildo 1



## Movo de la Disketoj

En la ludado ĉiufoje oni rajtas movi nur unu disketon. Ne ekzistas tiel nomata "roki" (t.e. movi unufoje du disketojn) en ĉina ŝako. Krom la Marŝalo (aŭ la Generalo) ĉiu disketo povas esti oferata kiel viktimo aŭ esti ne-protektata. Sed estas malpermesata ia ajn movo kiu ignoras la matecon de sia propra Marŝalo (aŭ Generalo) aŭ lokigi ĝin sur punkto atakata.



En la moviĝo ĉiu disketo ne rajtas transsalti alian disketon, ĉu de sia propra aŭ de la malamika flanko. La sola escepto estas **Kanono** en elimino de malamika disketo. Sur ĉiu punkto rajtas lokiĝi nur unu disketo. Ĉiu disketo rajtas elimini la malamikan disketon, kiu troviĝas sur la alira punkto de la moviĝo. Pri la **Kanono** vidu sube.

La manieroj de moviĝo de diversaj disketoj estas jene:

La **Marŝalo** kaj **Generalo** rajtas moviĝi nur en sia palaco unu paŝon laŭ la vertikala aŭ horizontala linio. Male kun aliaj disketoj ili estas malpermesataj: 1-e, sinoferi al la rivalo kiel viktimoj; 2-e, ignori sian matecon kaj 3-e, stari vidalvide (t.e. sur la sama linio kaj neniu alia disketo inter ili).


La **Eskortanto** moviĝas nur laŭ diagonalo en la palaco, ĉiufoje unu paŝon.

La **Elefanto** kaj **Ministro** moviĝas ĉiufoje du paŝojn ambaŭ laŭ la sama diagonala direkto kaj nur interne de la propra areo.

La **Ĉaro** moviĝas laŭ vertikala aŭ horizontala linio ĉiufoje je tiom da paŝoj kiom oni volas, sed nur en la sama direkto.

La **Ĉevalo** moviĝas ĉiufoje du paŝojn, la unuan laŭ vertikala aŭ horizontala linio kaj la duan laŭ diagonala direkto. Se troviĝas ĉe la unua paŝo alia disketo, ĝi ne rajtas tien iri. Ĝia nova pozicio devas esti sur la punkto formita de la tria vertikala kaj la dua horizontala linioj aŭ de la dua vertikala kaj la tria horizontala linioj for de sia antaŭa pozicio. (Vidu bildon 2. En la bildo la ruĝa ĉevalo ne povas elimini la nigran, sed la nigra povas elimini la ruĝan.)

La **Kanono** moviĝas same kiel la Ĉaro. Sed por elimini malamikan disketon ĝi devas transsalti unu kaj nur unu disketon, kiu estas nomata kanon-apogilo. Kanon-apogilo povas esti disketo de la propra aŭ de la malamika flanko. Sen apogilo ĝi ne rajtas matigi la marŝalon aŭ generalon de la malamika flanko, nek ataki aliajn disketojn des pli ne ilin elimini, kaj sen elimino ĝi ne rajtas transsalti alian disketon.



Bildo 2

La **Peono** kaj **Soldato** moviĝas ĉiufoje nur unu paŝon kaj en direkto al la malamika flanko laŭ vertikala linio. Sed transpasinte la limriveron, t.e. en la malamika areo, ili rajtas moviĝi ankaŭ laŭ horizontala linio. Tamen ili neniam rajtas moviĝi en la direkto al sia propra flanko, ĉu en la propra aŭ en la malamika areo.

Bildo 2. montras moviĝojn kaj eliminojn kiujn la **Ĉevalo**, **Elefanto-Ministro** kaj **Kanono** rajtas aŭ ne rajtas fari. La diklinio montras la fareblajn kaj la punktolinio, la nefareblajn.

## Rezulto de Maĉo

La ludanto estas konsiderata kiel venkito, se:

1. lia **Generalo** aŭ **Marŝalo** matas aŭ staras vidalvide kontraŭ tiu de la malamika flanko,
2. li povas movi neniu el siaj disketoj,
3. li ripetade persekutas la malamikan **Generalon** aŭ **Marŝalon** aŭ iun neprotektatan malamikan disketon.

Oni notu ke la punktoj 2 kaj 3 estas malsamaj ol ĉe la internacia ŝako.

La partio finiĝas per egaliĝo ĉe okazo se neniu kapablas matigi la malamikan **Generalon** aŭ **Marŝalon**, aŭ ĉe okazo de interkonsento.



# Rakontoj pri Afanti

— Ujguraj popolaj rakontoj —

## Kie Estas la Kato?

Iun tagon, Afanti revenis de la bazono kun tri ĝinoj da viando kaj diris al la edzino:

“Kara edzino, preparu, hodiaŭ vespere, bongustajn pasteĉojn ke ni bone frandu.”

La edzino fritis la viandon kaj formanĝis. Vespere ŝi prezentis al sia edzo nur bovlon da past-folietoj.

“Kie estas la pasteĉoj?” demandis Afanti la edzinon.

“Kiam mi knedis la farunon post dishakado de la viando, via damninda kato ŝtele ĝin formanĝis.”

Afanti kaptis la katon, kaj ekpesis ĝin per pesilo. Ĝi pezis ĝuste tri ĝinojn, nek pli nek malpli. Nun Afanti sin turnis al la edzino:

“Vidu, kara edzino! se tio ĉi estas la kato, do, kie estas la viando? Kaj se tio ĉi estas la viando, do, kie estas la kato?”

## Turbano\*

Portante sur la kapo turbanon, grandan kiel korbo, Afanti promenis sur strato. Al li venis iu renkonte kaj petis:

“Bonvolu legi por mi ĉi-tiun leteron, estimata instruitulo.”

“Tamen nekonante eĉ solan alfabeton, mi ne povas legi la leteron.” diris Afanti.

“Vi portas ja tian grandan turbanon sur la kapo!” ekmiregis la homo. “Ĉu vere eĉ leteron vi ne scipovas legi?”

Depreninte la turbanon de sur sia kapo, Afanti surmetis ĝin sur la kapon de la alparolanto kaj diris:

“Nu, nu bone! Se la turbano legpovigas, do vi ĝin surhavu, kaj mem legu la leteron!”

## Ĉe Festeno

Iun tagon, en ĉifona vesto Afanti ĉeestis geedziĝan festenon. Sed ĉe la festena tablo neniu lin

alparolis aŭ priservis per manĝaĵoj.

Afanti tuj reiris hejmen, kaj alivestinte sin per bela brodita surtuto li denove venis al la festeno. Tiam la mastro tuj kaj respektplene invitis lin al la honora sidejo, kaj regalis lin per abundaj bonaj manĝaĵoj kaj vino. Afanti levis la aperturon de la maniko de sia surtuto kontraŭ la plado, kaj diris:

“Bonvolu manĝi, mia surtuto!”

“Kion tio signifas, Afanti?” ekmiregis la mastro tion vidante.

“Se tio, kion vi estimas, estas mia nova surtuto, do, ĝi ĝuu la bongustajn manĝaĵojn kaj vinon!”

## Englutu Vivan Katon

Afanti havis tre ŝerceman najbaron, kiu foje faris ŝercan demandon al li:


“Afanti, kiam dolĉe mi dormis hieraŭ nokte, muso eniris mian stomakon tra la buŝo. Kion fari do?”

## Novaj Poŝtmarkoj

### Nova Vivo de Tibetanoj

La 47-a serio de poŝtmarkoj kun 5 intajle 2-koloraj pecoj speciale emisiita (25-11-1961) pri la nova vivo de tibetanoj.

“Kanto de Liberigo”	1-238	4c.	Hieraŭaj sklavoj —		
Nune la feliĉo enradikiĝis	2-239	8c.	Hodiaŭaj popolrepresentantoj	4-241	20c.
Celebrado de Riĉa Rikolto	3-240	10c.	Feliĉa generacio	5-242	30c.



“Jen estas facile forigi la ĝenajon!” diris Afanti. “Tuj kaptu katon, ĝin englutu vivan, kaj ĝi certe formanĝos la muson, ĉu ne? Ja ekzistas neniu alia rimedo krom tio.”

## Puno al la Bovpatrino

Iun tagon, la bovido de Afanti rompis la bridŝnuron kaj forkuris. Afanti vane klopodis ĝin kapti kurante tien kaj ĉi-tien kun granda peno ĝis elĉerpiĝo kaj ŝvitego tra la tuta korpo. Tiam Afanti kaptis stangon kaj kun kolero ekbategis la bovpatrinon. Vidante tion, lia edzino furioze koleriĝis, kaj tuj alkuris al li kaj forprenis la stangon, riproĉante:

“Ho, Afanti, ĉu vi freneziĝis?! Ja estas la bovido kiu rompis la ŝnuron, sed kial vi batas ĝian patrinon — la bovinon?”

“Hm, dio scias kiu freneziĝis.” serioze respondis Afanti. “Estas klare, ke la bovinaĉo instruis ŝian filon pri tio, se ne, kiel la malgranda bovido sciis rompi la bridŝnuron?”

## Broga Buljono

Iun tagon, Afanti iel ofendis sian edzinon. Kun kolero la edzino kuiris intence la supon de ŝafajo brule broga, kaj ĝin metis antaŭ Afanti, dirante:

“Afanti, ĉifoje mi multe spicis la ŝafajbuljonon, ke ĝi rave bon-gustas. Rapide gustumu!” Dum ŝi parolis, la aromo de supo apetitive tiklis ŝian nazon, ke ŝi forgesis, ke la brule varmega supo brogas, kaj ŝi levis la supon al sia buŝo kaj ektrinkis. La supo mordadis ŝin de la buŝo ĝis la stomako, tiel ke ŝi eklarmis pluve. Vidante la larmadon de sia edzino, Afanti diris kun miro:

“O — i — a! kara edzino, kio estas al vi! Pro kio vi ploras englutante buljonon?”

“Nenio! Nenio!” diris lia edzino. “Mi nur ekmemoras mian panjon, kiu tre ŝatis ŝafajbuljonon, sed bedaŭrinde ŝi jam ne plu estas inter ni.”

Tiam ankaŭ Afanti ektrinkis plenbuŝon da supo, kaj rezulte ankaŭ li eklarmis brogite.

“Aj, Afanti, kial ankaŭ vi ekploras?” demandis la edzino.

“Nenio, nenio.” diris Afanti. “Kiam via patrino mortis, vi ankoraŭ estis senscia knabino. Mi ekmemoris pri via tiama stato: orfa, senparenca, ho, kiel kompatinda vi estis! Tial mi eklarmis de maĝojo.”

## Ŝtelisto, Kiu Alvenas Ĉiutage

Afanti gaste loĝis en la oficejo de iu gubernio. Iun tagon, la



gardistoj kaptis ŝteliston kaj portis lin al la gubernatoro, kiu tuj rekonis lin je la unua vido, kaj lin insultis kun furioza kolero:

“Diablo, senhontulo! Hodiaŭ vi estas alportata jam la okan fojon al mia oficejo.”

Afanti eksplodis per brua ridego apude. La gubernatoro tre koleris kaj demandis al li:

“Ĉu vi ridas je mi?”

Afanti diris: “Estas nenio, ke la ŝtelisto estas alvenigita jam ok-foje, ja ne mankas ŝtelisto, kiu alvenas ĉiutage.”

*\* Volvaĵo el blanka tuko surkape portata en malnova tempo nur de tiuj, kiuj sciis legi kaj konis koranon.*

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Studo pri Nuntempa Mongola Lingvo

La Ĉina Scienca Akademio kaj la filologiaj institutoj de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, post enketo kune farita jam havigis al si klaran ideon pri la fundamenta stato de la mongola lingvo uzata en diversaj partoj de la tuta lando kaj faris apartigon inter ties malsamaj dialektoj. La koncernaj institutoj fiksas serion da modernaj terminoj por la mongola lingvo kaj kompilis du volumojn de hana-mongola vortaro, estas krome klopodantaj enprofundi en la

studon pri la evoluo kaj trajtoj de la mongola lingvo kaj pri pliriĉigo kaj disvolvo de la moderna mongola lingvo. Baldaŭ aperos aliaj du verkoj: *La Moderna Mongola Lingvo* kaj *La Historio de la Mongola Skriba Lingvo*.

## Studo pri la Filozofiaj Pensoj de Konfucio

Konfucio (551-479 a.K.) estis la plej granda edukisto kaj pensulo en la antikva Ĉinio. Pri liaj filozofiaj pensoj oni havas malsamajn taksojn. Antaŭnelonge inter la sciencistaj rondoj de Pekino disvolviĝis diskutado pri

tiu ĉi demando. La Pekina Filozofia Asocio invitis Feng Joŭlan, profesoron de Pekina Universitato, kaj aliajn por fari tiurilatajn prelegojn al pli ol 1,000 aŭskultantoj. Parto de la gazetoj kaj tagjurnaloj eldonataj en Pekino ankaŭ aperigis artikolojn de Guo Moĵo, Fan Venlan kaj aliaj scienculoj, kiuj publikigis siajn malsamajn opiniojn kaj pritaksojn.

## Antikva Epopeo

La epopeo *Historio de Kesar* fame konata inter la tibetanoj kaj mongoloj estas la plej longa poemo ĝis nun trovita en nia lan-

# ĈINIO

## I. *La Vento Orienta*

Ho, festo  
 Tempesta,  
 Ho, glora  
 Aŭroro  
 De ĉina  
 Montpino,  
 Gratulon!  
 Tutnulas  
 Fremdfioj:  
 Ĉinia  
 Ĉapitro  
 Plej mita  
 Dekovris:  
 Ekblovig  
 Tutforte  
 Senmorta,  
 Torenta  
 Novvento.  
 Ĝi spiras  
 Kaj diras:  
 "Ho, bardoj  
 Fajrardaj —  
 Verkistoj,  
 Pentristoj,  
 Poetoj,  
 Rakete  
 Disportu  
 Senmortan  
 Eggloron:  
 Pri koro  
 Malmola  
 Varmbola,  
 Pri koro  
 Sonora —

Partio  
 Ĉinia  
 Ruĝfonta,  
 Rakontu!  
 1.  
 Turmentoj  
 Dum centoj  
 Da jaroj...  
 Kaj staro,  
 Kaj premo,  
 Kaj ĝemo  
 Handhande  
 La landon  
 Regadis...  
 Invadoj,  
 Militoj  
 Vizitis  
 Kruele:  
 Muelis  
 L' amasojn.  
 Trapasis  
 Banditoj  
 Profiton  
 Serĉadi...  
 "La radon  
 Progresan  
 Senĉese,  
 Kunule  
 Ni rulu..."  
 Disvastis  
 Fremdmastroj  
 Ĉi penson.  
 Intense

Agitis  
 Pagitaj  
 Diksentaĵoj  
 Agentoj  
 Kaj penis  
 Veneni  
 Disvolvon  
 Popolan...  
 Ekboldis  
 Popola  
 Kaldrono...  
 Friponoj  
 Ekagis,  
 Ĉar pagis  
 Kaj mastroj,  
 Kaj pastroj  
 Ŝajnpiaj.  
 Sed fioj  
 Iliaj  
 Neniam  
 Konkeris  
 La ferajn...  
 Kaj jene:  
 Hienoj  
 Multree  
 Kun veoj  
 Premitojn  
 Agitis.  
 Konfese  
 Promesojn  
 Mensogajn,  
 Allogajn  
 Psalmadis...  
 Revadis  
 Popolo  
 Grandvolan

Gvidanton —  
 Savanton.  
 Ĉar vendis  
 Ĝin fremdaj  
 Kaj "siaj"...  
 Ĉinio —  
 Malsataj,  
 Batataj  
 Ne dormis:  
 Sinformis  
 Spirito  
 Egmita.

### 2.

Eventoj —  
 Torento  
 De volo  
 Popola,  
 De digno  
 Bonsignis:  
 Proksimas  
 Finlimo  
 De ĉiaj  
 Rabfioj,  
 Suferoj  
 Neteraj.  
 Kaj ĉinoj,  
 Finfine,  
 Forigos  
 Intrigojn,  
 Fremdbarojn

Kaj staron.  
 Sufero,  
 Kolero  
 Hirtigis,  
 Instigis  
 Malriĉajn.  
 Dediĉe  
 Bonrevo  
 Sinlevis  
 La homa,  
 Sennoma  
 Multmulto...  
 Rezulto:  
 Burĝara  
 Regnaro.  
 Eksmastroj  
 Ekgastis...  
 Naŭvaj  
 Ekvivis  
 Kun vera  
 Espero:  
 Jam finos  
 Je ĉinoj  
 Sufero,  
 Mizero  
 Kaj dronos  
 Drakonaj  
 Multjaraj  
 Rabfaroj...  
 Sed tamen  
 Vanvane.



do. Pri la sumo de volumoj kaj la amplekso de tiu ĉi epopeo, oni ĉiam havis malsamajn opiniojn. Sur bazo de kolektado, enketo, esplorado kaj studado pri tiu ĉi epopeo farita de la laborantoj de folkloro literaturo de Kinaj-provinco en lastaj jaroj, oni taksas, ke ĝi enhavas pli ol tricent mil versojn

krom la prozaj rakontoj kaj paroloj.

Tiu ĉi epopeo rakontas la heroaĵojn de Kesar de la antikva Ling-regno en sia defendado de la patrolando, forigo de tiranoj, savo de bonuloj kaj ekstermo de demonoj kaj monstroj. Ĝi okupas gravan pozi-

cion en la kultura vivo de la tibeta popolo, ekz. en rakontoj, kant-rakontoj, dancoj, pentraĵoj kaj skulptaĵoj oni ofte prenas enhavon el tiu ĉi epopeo kiel temon. Oni ne nur ĝin kantas en ordinaraj tagoj, sed ankaŭ prenas ĝin kiel panegiron en festaj tagoj. Oni konjektis, ke la epopeo

Bienaj	Ekblouis	Prezentas	Ŝirmejo —	Disvolva
Hienoj	Minaca	La drakon	Armeo	Fortblove
Posedis	Malpaco.	Kun frako —	De ruĝaj	Eliĝis:
Rimedojn	Popolajn	Fremduloj,	Malfuĝis:	Turniĝis
Perfidajn.	Tavolojn	Riĉuloj,	Ŝajnvente,	Al bono
Inside	Denove	Iliaj	Torente	Belsona —
Ekcedis;	Tutpove	Ĉiniaj	batalis...	Feliĉo
Procedis	Atakis	Pagitaj	Mortfalis	Kaj riĉo.
Alie:	Enpako —	Elitoj!"	Sentimaj...	Konscio
Al ĉiuj	Ekstara	Tiele	Kaj cimoj,	Partia
Geĉinoj	Barbara.	Apelis	Kaj ŝarkoj —	Altgrada
Rafine		Partio	Je aroj	Tenadis
Promesis		Ĉinia.	Rabbandoj	La ruĝajn...
Revfeston —	3.	Leviĝis,	Enlandaj,	Ekfuĝis
Libero	"Ho, stelo	Aliĝis	Rabbandoj	Rabistoj,
Sen peroj,	Ribela	Ĉi tiun	Fremdlandaj,	Buĉistoj.
Agrara	De nia	Justkrion	Interne,	Ekĝemis
Bonfaro.	Ĉinia	Milmiloj	Ekstere	Edeno
Sed kaŝe,	Nasklando,	Ĉinfiloj.	Furiis...	Ilia.
Malkaŝe	Mirhandaj,	Egkreskis	Partio	Partio
Bienaj	Leviĝu,	Protestoj	Kaj Mao	Malmola,
Ekpenis:	Altiĝu!	Amasaj...	Kontraŭis:	Popolo
Liberon	Ni tenas	Frakaso	Ĥaason	Venkporta
Po ero	Benbenan,	Atendis	Elfosi	Tutforte
Surpremis.	Helrelan,	Potencajn,	Longjare	Konkeris
Deprenis	Fidelan	Ilian	Multbarojn	Liberon
Molmole,	Belsorton —	Socion	Venkadis...	Je ĉiam,
Malmole	Senmortan	Rabungan.	Kaj rado	Je ĉiam!
Agraran	Popolan	Lozungojn —		
Erfaron.	Lumbolan	Ruzbridojn,		
Denove	Estonton!	Malfidis		
Regpovaj	Ni fontojn	Hommulto.		
Kun fremdaj	Sklavecajn	Rezulte		
Ekvendis	Maldece	Per forto		
Egvolan	Ĝisguto	Senvorta		
Popolon.	Sangputa	La vero		
Denove	Sekigos!	Kolera,		
Sinmovis	Fratligu	Senmorta		
Serpento	Vi ĉiuj	Sinportis,		
Fremdvenda —	Ĉiniaj	Ekbolis...		
Eksuĉis	Rabitoj!	Popola,		
Kaj buĉis.	Nur mito	Plenbrava		
Denove	Stultventa	La sava		

La supra poemo estas la unua parto de la longa poemo de la verkinto. Ĝi plene montras la amikecon de la bulgara popolo al la ĉina kaj la simpation al ĉina revolucio. Tial kvankam tre limigita estas la spaco de nia gazeto, tiun ĉi parton ni aperigis sur tiu ĉi numero.

— La Red.

aperis eble en la dekunua jarcento, do ĝis nun ĝi jam havas historion de preskaŭ mil jaroj. Antaŭ pli ol cent jaroj la epopeo jam vekis grandan intereson inter la literaturaj rondoj enlandaj kaj eksterlandaj, kaj tre frue jam aperis ĝiaj tradukoj en la lingvoj rusa, franca, angla, germana,

mongola kaj hinda. Multaj instruituloj studis ĝin. En la jaro 1957, la Scienca Akademio de Sovetunio speciale eldonis disertacion de la studado pri tiu ĉi epopeo. La instruituloj unuvoĉe konfirmis ĝian popolecon kaj brilan artan sukceson, kaj opinias ke ĝi estas enviciginda en la

literaturan trezorejon de la mondo.

Ĝis hodiaŭ, la laborantoj de folkloraj literaturo de Kinhaj-provinco jam kolektis diversajn eldonojn, mankopiojn kaj diktaĵojn kun ĉirkaŭ 25 milionoj da vortoj kunigante la samajn kaj rezervante la variajn. Oni divi-

# K-do S.V. Sariĉev ĉiam en Nia Memoro

K-do S. V. Sariĉev en Moskvo estas veterana esp-isto en Sovetunio kaj senlaca kunlaborinto de nia gazeto. Ekde la reapero de nia gazeto en 1957, li fariĝis ĝia ĉefperanto en Sovetunio. Li eminente plenumis la laboron, opiniante ke la gazeto multe kontribuos al la amikeco inter la popoloj de la du frataj landoj. Kiom nin malĝojigas la informo de lia morto! Ni esprimas nian profundan funebron kaj koran kondolencon al lia familio.

— La Red.

## Lastan Saluton al K-do Sariĉev

Informiĝinte ke nia estimata sovetia k-do S. V. Sariĉev forpasis, mi ekmemoris pri mia renkontiĝo kun li antaŭ 5½ jaroj.

En aŭgusto 1956, Ĉina Esperanto-Ligo sendis tri-personan delegacion al la 41-a Universala Kongreso okazinta en Kopenhago. Mi estis unu el la tri membroj de la delegacio, kaj la aliaj estis k-doĵ Ĵelezo kaj Ĉen Juan. Survoje al Kopenhago, ni preterpasis Moskvon kaj renkontis tieajn esp-istajn kamaradojn, kun kiuj ni multe parolis pri esp-movado. La aliaj moskvaj esp-istoj estis ĉiuj okupataj je diversaj laboroj kaj nur havis libertempon en vespero, dum k-do Sariĉev kiel pensiulo estis libera kaj povis akompani nin en la tago. Kaj dank' al lia fervora akompanado, ni havis la okazon viziti keikajn tre vidindajn lokojn en Moskvo.

K-do Sariĉev piedire akompanis nin al la mondfama Tretjakovskaja Galerio, kie ni kun grandega intereso rigardis la mirindajn artajn pentraĵojn. Des pli interesiĝis ni kiam k-do Sariĉev donis al ni iajn necesajn klarigojn. Ankaŭ dank' al la klopodo de nia akompananto, ni sukcesis sen ia atendo en la longa vico de vizitantoj eniris la Maŭzoleon de Lenin kaj Stalin kaj salutis al tiuj du grandaj instruantoj de la internacia proletaro. Poste ni vizitis la Muzeon de Lenin kaj trarigardinte la diversajn ekspoziciatajn objektojn, ni pliintimiĝis pri la batalplena vivo de tiu revolucia giganto.

Nia kunestado kun k-do Sariĉev ne estis longtempa, sed li kiel modesta kaj sincera k-do donis al ni tre profundan impreson. Kiel domaĝe estas, ke nia unua renkontiĝo kun li nun fariĝis la lasta. Estis informite, ke li ekmortis super sia skribmaŝino, skribante ion en Esperanto. Tio signifas, ke k-do Sariĉev kiel malnova sindona esp-isto ja laboris por nia movado ĝis la lasta sekundo de sia vivo.

Sendante nian lastan saluton al k-do Sariĉev, ni nepre pli energie laboros por Esperanto, la utila interligilo de internacia proletaro kaj por la solidareco inter ĉinaj kaj sovetiaj esperantistoj.

**Chang Chichen**

dis ilin laŭ la enhavo, kaj jam en 35 volumojn. Nun la kolektado kaj ordigado estas ankoraŭ daŭrigataj.

### Mikrogravurado

“Mikrogravurado” estas kurioza arto. La ebura gravuristo Feng Gonghia, membro de la Instituto de Kulturo kaj Historio de Guangdong-provinco, estas virtuozo pri tiu ĉi arto. La bildo de 18 bud-

hismaj saĝuloj de li gravurita estas klare videbla nur tra lupeo kun potenco de dekobla pli-grandigo. Kvankam la bildo estas treege malgranda, tamen la haroj kaj barboj kaj iliaj apartaj trajtoj de la figuroj estas distingeblaj. Sur eburo malgranda kiel sezamo, li povas gravuri mallongan verkon el ĉirkaŭ 100 ideografiaĵoj. Unu haro povas kovri sur ĝi tutan linion da ideografiaĵoj.

### Interesaj Eksperimentoj pri Akvoproduktoj

La sciencaj laborantoj pri akvoproduktoj en Guangdong-provinco faris lastatempe interesajn eksperimentojn: ili plirapidigis la kreskon de tiuj bongustaj sed malrapide kreskantaj fiŝoj kiaj idelusoĵ, piceusoĵ, nobilisoĵ kaj molitriksoĵ\* per speciala

# Esperanto Marŝas

## Revigliĝas Malnovaj Geesperantistoj

En Ankang — malgranda urbo en Ŝenhi-provinco, troviĝas kelkaj esperantistoj, eĉ du pioniraj de la ĉina E-movado. Ili estas Ĉen Ĝaŭŝu kaj Ĝang Hujĝi, geedzoj jam pli ol sesdek-jaraĝaj.



K-do Ĉen Ĝaŭŝu

K-do Ĉen esperantistiĝis en 1918, kiam li estis studento en la Pekina Universitato, kaj k-dino Ĝang en 1925, kiam ŝi estis studentino en la Pekina Virina Pedagogia Universitato. Kiam la fama, rusa blinda esperantista poeto V. Eroŝenko instruis Esperanton en la Pekina Universitato en 1922-1923, k-do Ĉen pli perfekte studis la lingvon. En 1923 li kune kun siaj kamaradoj fondis la Pekinan Esperanto-Kolegion kun subteno de s-ro Caj Juanpej, tiama rektoro de la Pekina Universitato, kaj s-ro Lusin, la fama verkisto. Kvankam la Kolegio funkciigis nur malpli ol tri jaroj,

tamen pli ol cent fervoraj kaj entuziasmaj esperantistoj estis elkulturitaj.

Dum sia juneco, k-do Ĉen kaj k-dino Ĝang fervorege kaj ofere me agis por disvastigi Esperanton, kaj nun, ili revigliĝas, kun freŝa entuziasmo por ree kontribui al Esperanta movado en servo al socialisma konstruado de la patrolando kaj la mondopaco.

Li Kehi


## Kunlaboro por "Il-maŝina Terminaro"

Antaŭ nelonge ni ricevis informon de s-roj Kenneth McLennan kaj Edward M. Rosher pri tradukado de terminoj de ilmaŝinoj. Ili celas unue aldoni esperantan tradukadon al la seslingva (franca, germana, angla, hispana, itala kaj rusa) *Indekso al Klasifikadoj de la International Guide des Machines* (Internacia Gvidlibro de Maŝinoj) eldonita ĉiujare de "Bureau de Documentation Industrielle" kaj poste surbaze de la tradukitaj materialoj kompili il-maŝinan terminaron kun difinoj kaj kiel eble ilustraĵoj, aldonante nomojn de aliaj maŝinoj netroviĝantaj en la nomita gvidlibro. La laboro estas farata en la kadro de Terminologia Centro de I.S.A.E. kaj estas sufiĉe ampleksa, tial ili petas kunlaboron de kompetentaj esperantistaj fakuloj kiuj scipovas unu aŭ plurajn el la suprediritaj ses lingvoj. Detalojn oni povas informi de la inicia-

tintoj: S-ro Kenneth McLennan, 30, Lower King's Avenue, Exeter, Anglujo; S-ro Edward M. Rosher, Tamalpais, Kingsley Green, Anglujo.

## En Ĉeská Třebová (Ĉ.S.R.)

En septembro lastjare okazis E-ekspozicio en Ĉeská Třebová, Ĉeĥoslovakio, kaj multaj personoj



ĝin vizitis. Funkcias tie ankaŭ kurso de la lingvo internacia. Ĝin partoprenas 20 gelernantoj. Esperantista Rondeto en tiu urbo laboras bone. Kun multaj landoj korespondas la rondanoj.

Vladimir Hampel

## Esperanta Kurso sur Granda Franca Ĵurnalo

En Rouen, ĉefurbo de provinco Normandie en nord-okcidenta parto de Francio, la esperantistaro sukcesis aperigi Esp-an kurson ĉiusemajne en la Junulara Rubriko de la granda ĵurnalo "PARIS-NORMANDIE".

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

bred-metodo, kun la rezulto ke en nur kvin aŭ ses monatoj tiuj fiŝoj kreskis ĝis 1,500 gramoj, t.e. en tempo-daŭro de nur 20% de tiu por natura kreskado. Ili

ankaŭ elkulturis nutro-riĉajn manĝaĵojn por fiŝoj, enloĝigis la marajn salikokojn en sensalan akvon kaj bredis bon-speciajn hibridojn de vietnamaj kaj ĉinaj

fiŝoj kaj en ĉio ĉi tio ili akiris kontentigajn rezultojn.

\* vidu noton sur p. 8-11 ("Mito" pri Fiŝoj)



# Sur Nia Librobreto

Nguyen Xuan Tram: **Surtera Infero**—literatura fakta raporto verkita okaze de la internacia virina tago en 1960, tradukita de Nguyen Ming Kinh kaj Nguyen Minh Tung kun postparolo de s-ino Isabelle Blume, membro de la Tutmonda Packonsilantaro, kaj eldonita de Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio. 13 × 19 cm., 120 paĝoj. Prezo neindikita. Mendebla ĉe: So Xuat Nhap Khu Sach Bao, 32 Hai Ba Trung, Hanojo, Vjetnamio.

Ĉiuj ja bone memoras la Oswiecim-koncentrejon de hitler-reĝimo kaj multaj esperantistoj eble legis la verkon *Medalioj* de Zofia Nalkowska, en kiu la verkistino rakontis multajn harhirtigajn barbarajojn de la faŝistoj. Eble oni opiniis, ke tiaj barbarajoj jam forpasis por ĉiam kaj neniam plu okazos. Tamen la realo ne kontentigas tian konfideman bonvolon. La adorantoj de hitlerismo ankoraŭ regas ie eĉ nun. Se iu tion ne kredus, li legu libreton *Surtera Infero*. Ĝi

montras al li plej aŭtentikajn kaj plej konvinkajn faktojn.

La verkinto de la libreto renkontis kvar virinojn elsavitajn de pli ol trijara suferado en la malliberejoj de Sudvjetnamio kaj skribis la personajn spertojn de unu el ili pri arestado kaj torturo en la sudvjetnamaj karceroj. Krom nuda fakto li do skribis nenion alian.

La enhavo estas simpla. Oni povas ĝin resumi per kelkaj vortoj: **la plej teruraj, malhumanaj, kaj abomenindaj barbarajoj en la nuna Sudvjetnamio.**

Tamen kompare kun faktoj priskribitaj en la libretoj ĉiaj teruraj adjektivoj kaj ankaŭ la titolo de la libreto mem estas tre palaj. Ĉu iam oni aŭdis, ke estas permesataj al la malliberigitaj havi neniom da vestaĵoj sur la korpo, ĉu viraj ĉu virinaj, ĉu en somero ĉu en vintro? Ĉu iam oni aŭdis la torturojn elŝiri homajn haŭton kaj karnon per ardaĵ pinĉiloj aŭ pendigi iun ĉe la plafono kaj ŝnurligi lian testikujon al ŝtono ke la turmentito perdis konscion pro netolerebla dolorego, kaj multajn similajn? Pripensiga estas tio, ke multaj el tiaj turmentoj portas nomojn amerikajn, ekz-e “amerika torturo”, la “Ĉikago-torturo” ktp. Ja ĉio ĉi tio priskribita en la libreto okazas nenie alia ol Sudvjetnamio, kies pupa reĝimo ekzistas nur dank’ al la financaj kaj militaj helpoj de la usona registaro.

La homaro ĉiam sopiras al paco, paco ne nur inter ŝtatoj, sed ankaŭ paco enlanda, por la vivo de la vasta popolamaso. Ĉu sub tia reĝimo, kiu praktikas tian malhumanaĵojn povus ekzisti paca vivo de la popolamaso? Ĉu la

pacdefendantoj povus fermi siajn okulojn kaj prisilenti kontraŭ tiaj barbarajoj?

La lingvaĵo de la libreto estas simpla kaj flua kvankam ne tute senriproĉa. Mi ĝin rekomendas al ĉiuj, kiuj kuraĝas rigardi la faktojn kaj decidas defendi la pacon.

**Honfan**

**Lernolibro de Oftalmologio** de prof. Seiiĉi Kato, 18 × 26 cm., 88 p., tole bindita; eld. de ELDONO AOŜIMA; prezo: 1.40 usonaj dolaroj; aĉetebla ĉe Ja-



pana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati I, Tokio, Japanio.

La bone ilustrita lernolibro dividiĝas en du partojn, nome: **ĜENERALA PARTO**, konsistanta el 12 ĉapitroj pri vidorgano, vidkapablo, vidkampo, lumsento, kolorsento, pupilo, akomodado, refraktanomaliaj, movado de okulglobo, okulpozicioj, nistagmo, astenopeco; kaj **SPECIALA PARTO** konsistanta el 14 ĉapitroj pri larmaparato, konjunktivo, glaŭ-







## Pri transskribo de la Nomo de Prezidanto Maŭ

— Respondo al s-ano J. V. Dolinský (Ĉeĥoslovakio) —

Vi dubas pri la skribo de la nomo de nia prezidanto Maŭ, jen nia klarigo: Laŭ nia nova alfabeto ĝi estas skribata kiel Mao Zedong, sed en transskribado laŭ fonetikaj reguloj de Esp-o ĝi fariĝas Maŭ Zedong. La aliaj skribformoj estas aŭ neesperantaj aŭ antaŭe uzitaj. Nia nuna sistemo celas laŭeble uzi la esperantajn literojn obeante al la fonetikaj reguloj de Esp-o en la transskribado de la Han-lingva Fonetika Alfabeto aprobita de niaj Ŝtata Konsilo kaj la Nacia Popola Kongreso. Nia transskriba sistemo estas nur projekto por prova uzado. Ĝia avantaĝo estas ke ĉiu sono en la han-lingvo havas sian respondan literon en Esp-o; ĝia malavantaĝo estas ke kelkaj han-lingvaj sonoj ne povas esti precize reprezentitaj per esp-aj literoj, kelkaj povas esti esprimitaj nur per pli-malpli similaj sonoj. Kial ne *Mao Zedon*, ĉar ĝi povas prononciĝi kiel Ma-o Zedon, sen emfazo de la nazalo dulitera *ng*, kiun la *prononco* de han-lingvo havas. Maŭ estas la familia nomo, Zedong estas persona. Antaŭe la familia kaj poste la persona — jen estas la kutima ordo de la nomoj de ĉinoj.

— La Red.

komo, traŭmoj kaj malsanoj de palpebro, korneo, sklero, iriso, ciliara korpo, korojdo, retino, optika nervo, lenso kristalina, vitreca korpo kaj orbito. Kvankam ne sufiĉe ampleksa por prezenti al la legantoj ĉiujn detalojn de la scienco, tamen la verkinto lerte desegnis por ni ĝeneralan bildon pri ĝi. Li eĉ klopodis montri al ni per ĝi la novajn atingojn en oftalmologio. Lia lingvo estas komprenebla malgraŭ tio ke tie kaj tie enŝoviĝis en la teksto preseraroj kaj eĉ gramatikaj nekorektaĵoj (ekz. anstataŭ “la okulisto devas precipe atenti ĉu la malsana okulo havas lumsenton aŭ ne”, li skribis “la okulisto devas precipe atenti ke la malsana okulo havus lumsenton aŭ ne”; anstataŭ **provato**, li skribis **provatulo**; anstataŭ **oni bezonas**, li skribis **oni necesas** ktp.) Krom specialajn terminojn oni uzis en ĝi ankaŭ plurajn neologismojn, pri la neceseco de kies enkonduko mi dubas. Ĉu **kontraki** ne estas samsignifa kun **kuntiriĝi**? Ĉu **relaksi** ne signifas **malstreĉiĝi**? Se **blefaro** signifas **palpebron**, kial do necesas ĝin enkonduki speciale por la scienco oftalmologio? Estus bone, se la sciencisto-esperantistoj ankaŭ observos la principon de NECESO kaj SUFIĈO dum sia verkado en Esperanto. Mi trovas la verkon de prof. Seiĉi Kato bonvena, valora, rekomendinda al ĉiuj seriozaj geesperantistoj. La ĉiam pli riĉiĝo de scienca literaturo en Esperanto certe multe kontribuas al la evoluo de la lingvo internacia.

Ju Jiti

**Praha Gvidlibro** eldonita de la Eldonejo por Sporto kaj Turismo, Praha, 1960. 12½ × 17 cm. 186 paĝoj kun multaj ilustraĵoj inkluzive 16 tutpaĝajn kliŝojn. Bele bindita. Klara presado. Prezo: Kčs 16. Al vizitantoj ĝi estas riĉinforma kaj praktika helpilo. Precipe utilaj estas la indikaj numeroj pri vidindaĵoj en la teksto kaj la Plano de la Urba Trafiko almetita. Multaj adresoj

kaj telefonnumeroj necesaj por vizitantoj estas facile troveblaj. La tripaĝa malgranda vortaro kun instruo kiel legi la ĉeĥajn vortojn, donas necesan helpon al turistoj en tiu urbo. Ĝi estas gvidlibro kompetente redaktita kaj rekomendinda ankaŭ al legantoj ne vizitantaj tiun urbon tamen volantaj informiĝi pri ĝi.

**Seslingva informilo universitata**—informfolio verkita speciale por universitataj medioj, surhavas tekstojn anglan, francan, germanan, hispanan, rusan kaj japanan, kaj subskribojn de 50 profesoroj en 20 landoj. Prezo: 0.25 stelojn aŭ 0.06 ned. guldenojn por ĉiu ekz., plus afranko 10%. Mendu ĉe UEA.





## Deziras Korespondi

\* D-ino **Marianna Miĥajlova**, kun ĉl pri ĉt. pi. 1. USSR, Dneprodzerdzinsk, str. Sojuznaja 12, kv. 14.

\* D-ro **Zinovij Korn** kun Azio, Afriko, Latina Ameriko pri ĉt. Resp. gar. USSR, Krivoj Rog-11, Kaliningradskaja 6, kv. 27.

\* **En Sovetunio** estas malpermesita la forsendo de uzitaj kaj neuzitaj PM en internaciaj poŝtaĵoj. Tial mi petas al miaj amikoj-filatelistoj plu ne sendi al mi PM en kovertoj kaj pardonon ke mi rekompenci jam ne povos. Restas **ebla nur afranka interŝ.** Venislovas Baltrus, Joniskelis, Hospitalo, Litovio, USSR.

\* **Grava Brazila asocio** por sciencoj, literaturo kaj artoj dez. **interŝ. infandesejnaĵojn** tutmonde. Centro de Ciências Letras e Artes, Caixa 76, Campinas, S.P., Brazilo.

\* S-ro **Oskar Hoff**, Caixa 1064, Campinas, S.P., Brazilo—dez. kor. kun ĉinaj, hindaj, vjetnamaj gesanoj, gekomencantoj kaj interŝ. librojn, gazetojn, pm k bk.

\* **Mag. Kowalski Jerzy**, Krakovo 2, Wroclawska str. 5a/8, Polujo—**kolektas filmplakatojn** el Ĉinio k Azio por ekspozicio. Bv. substreki en kia lingvo estas la presita afiŝo.

\* **Adolf Staňura**, str. Ĉkalov 863, Ostrava 8 poruba, Ĉeĥoslovakio interŝ. stenografiajn publikajojn kun ĉl. kaj serĉas kontakton kun geesp-istoj laborantaj en kuirgasfabrikoj en socialistaj landoj.

\* **Boris Ŝĉavinskij**, str. Savuŝkina, 1, kv. 15, Leningrad-P-183, USSR. (kolektanto de artobjektoj) dez. kor. tutmonde pri pentrarto k

interŝ. per ipk (kopioj de pentraĵoj, bildoj, skulptaĵoj), libroj pri pentrarto k t. s. objektoj.

\* **Georgi Dimitrov Livorov** (17j. lernanto), Bulgario, Gabrovo, Ĉerkovna 1, kun Ĉinio, Azio, Afriko k Ameriko pri ĉt k interŝ. pm, pk, librojn.

\* **Hristo Mitev Vălev** (radioteknikisto), Bulgario, ur. Kalofer, Radio Relejna kaj Televiziono Stacio-pinto Botev, kun radioteknikistoj kaj radioamatoroj el Ĉinio, Japanio, Sovetunio, Hindio, Aŭstralio, Indonezio k Izraelo.

\* **Snejana Taseva** (10-klasa lernantino), Bulgario, v. Zvâniĉevo, Pazarĝiŝko, kun ĈSSR, USSR, Pollando, Francio, Rumanio k Jugoslavio pri arto, filmoj, vivo, k interŝ. bk, fotojn, gazetojn, pentraĵojn tutmonde.

\* Gefratoj **Vasil D. Velĉev** (20j) k **Radka D. Velĉeva** (17j) kun ĉl pri ĉt; skribu al Bulgario, Gabrovo, str. Partizanska-16.

\* **Georgi Kitov**, Bulgario, Sofia 27, Biruzov 2-B—kun ĉl pri kino, foto, muziko, sporto, filatelo.

\* **Jiři Odstrčil** (28j mekanikisto), ĈSSR, Ĉekyne N.57, okr. Prerov-Morava, kor. k interŝ. pm, bk kun ĉl.

\* **Dvořáček Fr.**, ĈSSR, Praha 4, Krušinova 81, interŝ. pm kun ĉl.

\* **Barnabás Rimóczy**, (18j studento), Hungario, Budapest-IV, ker. Árpád 179, kun ĉl pri literaturo kaj artoj, interŝ. pm, ipk k alu-metetiketojn.

\* **Sri Soedono Pr.**, Djl. Surjoputran 41, Jogjakarta, Indonezio,—interŝ. pm kun filatelistoj.

\* **Eduardo Anĥimkov** (24j teknikisto), USSR, Jaroslavskaja regiono,

Nekouzskaja, Spasskaja poŝtejo, Ĉurlaki, kun ĉl pri ĉt.

\* **Tiiu Sein**, USSR, Estonio, Tallinn 6, Ristiku 57-15—kun ĉl pri ĉt.

\* **Ŝupik Viktor** (23j), USSR, Ukrainio, g. Sumi, ul. Kovaljovskaja 7, kv. 4 kun ĉl pri arkitekturo k konstruo, kolektas alu-metetiketojn k pk.

\* **Jurij Matveviĉ Siĉuk** (25j instruisto) k **Vladimir Matveviĉ Siĉuk** (29j inĝeniero) kun ĉl pri ĉt. Adr: 14 linia 94, Omsk-1, USSR.

\* **Ŝalajev Aleksandro**, str. Inĝenerna 27, Dnepropetrovsk-46—, USSR, kun ĉl interŝ. pm, bk, fotojn de artistoj, insignojn k alu-metetiketojn.

\* **Henry Erlandson** (elektristo), SM4AZD, Bengtstorp, Vikersvik, Svedio, interŝ. pi k pm de ĉl.

\* **Mins Tu** (27j oficiro), Vjetnamio, 18 str. Nguyễn Priĉú, Hanoi, kun gejunuloj de ĉl interŝ. historion, pk, pm.

\* **Bui Huu Den** (20j studento), Vjetnamio, 42 str. Tran Quy Cap, Hanoi, kun ĉl pri ĉt: pm, bk, foto, kino, insigno, libro,

\* **Guo Dateng**, (47j. instruisto) N-ro 47, V. P. Ang Yukanthor Phnom-Penh, Cambodia-kun ĉl. pri ĉt.

\* **Aleksandro Kajti**, str. Terez 9, Pecs, Hungario, interŝ. pk., E-gazetojn kun Ĉinio, Koreio, Japanio, Vietnamio k Indonezio.

\* **A. S. Nikitin**, Sovetia Komitato de Militveteranoj, ul. Kropotkina 10, Moskvo, USSR.

\* **V. Kolda**, Praha 12, Ŝumavskaja 14, Ĉeĥoslovakio dez. interŝ. pm. kaj pk. kun ĉl.

\* **Enna Paavo**, 23-jara radioteknikisto, dez. kor. kun ĉl. pri ĉt., str. Katani 4-1, Rakvere, Estonio, USSR.

\* 3 gimnazianoj el bulgara urbo Ruse, dez. kor. pri ĉt. k interŝ. esp-presaĵojn, bk. k.a. Nedo Georgiev Panov Kliment Ohridski 8; Sarkis Tateosian, str. "Balgarska Morava" 5; Stefan Stanev, str. "Balgarska Morava" 13.



La 90-a serio de poŝtmarkoj el 2 intajle presitaj 2-koloraj pecoj, emisiita (10-X-1961) de Ĉinio por memori la 50-an datrevenon de la Revolucio de 1911.

辛亥革命五十周年 1911-1961



10分  
中国人民邮政 (295)1961  
No 90.2-2

Portreto de Sun Jatsun  
2-295 10c.



Leviĝo de Vuĉang  
1-294 8c.

# Nove Eldonitaj Ĉinaj Poŝtmarkoj

La 46-a serio de poŝtmarkoj speciale emisiita (10-XI-1961) de Ĉinio kun bildoj de "3-koloraj Argilaĵoj de Tang-dinastio".

La nomita "3-koloraj argilaĵoj de Tang-dinastio" estas nomo por plur-kolora glazura argilaĵo de Tang-dinastio. Iliaj glazuraj koloroj ĉefe estas blanka, flava, ruĝbruna, verda, blua ktp., kaj ne limigitaj en 3 koloroj sur unu objekto. "3-koloraj" ĉi tie signifas plurkoloraj. Kelkfoje ili estas ankoraŭ en du aŭ kvar koloroj. Antaŭ Tang-dinastio argilaĵoj de nia lando plejparte uzis unusolan glazuran koloron. La apero de "3-koloraj argilaĵoj de Tang-dinastio" malfermis novan vojon por la disvolvo de plurkolora argilaĵo.

La objektoj elektitaj de la serio de pm. estas argilaj statuoj trovitaj en tombejoj de Tang-dinastio ĉe Si'an, Ŝenhi-provinco post la Liberiĝo, ilia erao estis ĉirkaŭ 684-756 p.K., nomita "prospera Tang-dinastio".

